



ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.



NUNTEPAĴOJ : Kruelegeco maroka, de *Pierre Loti*, esp. de *E. Bacquet*, (FRANCUJO).

DIVERSAĴOJ : La Piloloj de Doktoro Kohol, de *Hans Romanowicz* kun ilustraĵoj de *A. Raschka* (AŬSTRUJO).

FELIETONO : Poŝta Amo, de *Johano Munoz kaj Pabon*, kaj *Johano Garcia Martin* (HISPANUJO). — Tertremo, de *Amfiteatrev* (RUSUJO) kaj *Leo Belmont* (POLUJO).

LITERATURAJ PAĜOJ : Literatura Kroniko, de P^{ro} *Bucquet* (FRANCUJO).

PRI ESPERANTO : Cambridge, la urbo de l' tria Kongreso, de Pastro *J. C. Rust* (ANGLUJO). — Kroniko, Bibliografio, de *Stelet*, *Legedamiko*, *A. Montrosier*.

MILITISTARO KAJ MARISTARO : Esperanto kaj Ruĝa Kruco.

SCIENCA KRONIKO, de *Marcel Finot* (FRANCUJO).

VIRINA PAĜO : La modo, de *Roksano*.

ĈIULANDAJ KUTIMOJ : Knabina vivado, de *C. Steenbuch* (JAPANUJO). — La Harakiri, de *Ch. Pettit* kaj *P. Diffre* (ALĜERIO).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^r Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al :

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1^a Jaro : 12 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

RIPREZENTANTOJ : Brita Imperio: British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.
Svedujo: S^r P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stoeckholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponomere ĉe la Librairie de l'Esperanto, 46, Rue S^{te} Anne, Paris.

“ La Belga Sonorilo ”

DUONMONATA GAZETO. ESPERANTISTA.



Tiu revuo estas unu el la plej malnovaj ĵurnaloj Esperantistaj kaj oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista.

« La Belga Sonorilo » estas la sola gazeto, kiu eliras regule po dufojoj ĉiumonate; ĝi ekzistas jam de 5 jaroj kaj estas unu el la plej ŝatindaj revuoj el la Esperantista gazetaro.

Nuna abono jare : 6 frankoj.

Unu numero : 0.25 fr.

Sin turni al

S^{ro} J. COOX,

DUFFEL

(BELGIQUE).

Antaŭaj jarkolektoj : 1^a kaj 2^a fr. 5.00
3^a kaj 4^a fr. 6.00
Ĉiu sendo eksterlande pagas plie fr. 1.00



Premio al niaj legantoj.

Por esti agrabla por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transporto en ĉiun Eŭropan landon (Transmare, eksteren transporto plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorlogon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento estas fotografe montrata ĉi apude.

En la du kvalitatoj, la poŝhorlogo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de — « Tra la Mondo ».

Unua kvalitato: 30 fr. Dua kvalitato: 20 fr.

Ni ne akceptas la respondecon de l' abonaj numeroj de « Tra la Mondo » perditaj de la poŝto. — Ni faras la la adresanĝojn NUR laŭ peto AKOMPANATA DE 50 CENTIMOJ.

La manuskriptoj ne estas resendataj.

Oni povas repressi niajn artikolojn kiam malpermeso ne estas speciale farita, sed oni estas petata ĈIAM CITI LA DEVENON DE L'ARTIKOLO, t. e. la nomo « Tra la Mondo », kaj sendi al ni ekzempleron de la traduko.

Ni respondas nur al la leteroj akompanataj de la responsa poŝtmarko.

Kelkaj praktikaj aferoj.

Mi jam diris, en nia Novembra n^o, ke laŭ mia opinio, estas treege necese ke la esperantistoj vojaĝantaj, kutimiĝu viziti la konsulejon de la urboj, kiujn ili trapasas, tuj post sia alveno en ilin.

Bedaŭrinde, se, en multe da urboj, ekzistas jam *konsuloj*, multloke ne ekzistas ĝis nun *konsulejo*. Kaj, tial ke oni timas ĝeni konsulon, vizitante lin en sian privatan hejmon; tial ke, ankaŭ, oni ne scias je kiu horo oni povas lin trovi, oni preferas neuzi liajn servojn.

Por forigi ĉi tiujn malhelpaĵojn la agema grupo de *Le Creusot* (Francujo), al kiu ni jam ŝuldas tre praktikajn ideojn, ĉi tiel aranĝis la aferon.

« Ne povinte trovi esperantistan komerciston havantan magazenojn ĉe la centro de nia urbo — skribas al mi S^{ro} Dejean, sekretario de l' grupo, — nia komitato decidis loki niajn oficojn ĉe komercisto ne esperantista, sed esperantema. Sekve, nia grupo eldonis presafeton en kiu oni donas, Esperante, la ĉefajn informojn por loĝi en nia urbo, kaj por viziti la faman fabrikojn kaj aliajn vidindaĵojn.

Oni aldonis, en tiu presafeto, vortareton por la elparolado de kelkaj francaj vortoj necesaj por la fremduloj, kiuj volas viziti solaj nian urbon, kaj nomaron kaj adresaron de dek personoj (sinjoroj kaj sinjorinoj), kiuj bone parolas Esperanton, kaj volonte donos buŝe komplementajn sciigojn, se la presitaj informoj ne estos sufiĉaj. Estas montrataj ankaŭ, en la folio, la adreso de la esperantista klubo, kaj la tagoj kaj horoj de la kunvenoj kaj kursoj.

Do, kiam esperantista vojaĝanto sin prezentas ĉe nia konsulejo, 20, place Schneider, en la tabakvendejo de F-inoj Lan-

geron, la vendistinoj, kiuj ne komprenas senpage al li nian presafeton, sur kiu li trovas la necesajn informojn.

En tiu oficejo estas ankaŭ speciala poŝta kesto, en kiun la poŝtisto demetas la korespondatajn adresitajn ĉu al Esperantista konsulo, ĉu al la Publika Esperanto-Ofico. Ĉiutage komitatano, speciale deligita por tiu ofico, prenas la korespondatajn el tiu kesto, kaj respondas la demandojn. Se okazas ke, ial, li ne povas tion fari, li transdonas sian oficon al alia komitatano, kaj, tiel, la servado ne estas interrompita, kaj tamen neniu estas sklavo pro tio.»

Mi altiras insiste la atenton de la legantoj de nia revuo, pri tiu interesa letero de nia samideano S^{ro} Dejean. Ŝajnas al mi, ke en multaj urboj oni povus organizi simile la esperantistan konsulejon, kaj la publikan Esperanto-Oficejon.

Mi rimarkigas ankaŭ, ke la presafeto kostus preskaŭ nenion, kaj eĉ ke ĝi povus doni profiton. Ĉar ĝi enhavus reklamojn por la lokaj komercistoj (hoteloj, restoracioj, kafejoj, k. c.), por kiuj, kompreneble, oni devas pagi (rabato por la esperantistaj komercistoj, anoj de l' grupo).

Tre certe ankaŭ la « Iniciataj Sindikatoj », kaj aliaj societoj, kies celo estas altiri la turistojn, komprenis la utilecon de ĉi tiu organizaĵo, kaj eble helpus ĝin morale kaj mone.

N. B. — Oni bonvolu sendi novajn informojn, kaj komuniki novajn ideojn, prefere jam ie aŭ parte efektiviĝintajn, pri tiuj aferoj, al S^{ro} Rousseau, Esperanto-Oficejo en Bourg-Ain, Francujo.

TH. ROUSSEAU.

NIA PROJEKTITA VENONTA NUMERO.

Tertremo (Sekvo). — Piloloj de D^{ro} Kohol (Fino). — Sporta Kroniko, de S^{ro} L. de Guesnet. — Enketo pri Edukado: raporto de S^{ro} Th. Rousseau. — Hinda pago, de S^{roj} Vaughan kaj Fanshawe. — Bulgara edziĝo, de L^{to} Silvestriev. — Teatro fantaziaĵo de Garcia kaj Villanueva. — Hina pago, de fratoj Buchanan. — Kroniko, Bibliografio.



POST MAROKA VENKO.

Kruelegeco maroka.

La fama Raisuli, kiu malkvietigis parton de Marok', kaj kiun la Maroka Sultano decidiĝis fine kontraŭbatali, estas venkita de la ŝerifaj anaroj komandataj de l' ministro El Guebbaz. Malgraŭ tiu malvenko, la rabisto estas ankoraŭ timata, kaj multaj personoj estos rekuraĝigitaj, nur kiam lia kapo estos akroĉigita al la dentoj de l' muregoj de Tanger (Tanje).

Jen venas al mi antaŭen la estro malfrua kun sia bando. Li multe senkulpigas, tial ke li ĵus persekutis tri rabistojn *zemurajn* tre timegatajn en la lando; li kaptis ilin kaj ankaŭ iliajn ĉevalojn. Ili nun estas en senriska loko ligitaj, en lia domo, el kie ili estas alkondukotaj en Fez'on por suferi la *turmenton per la salo*, laŭ la leĝordonoj.

Dum ni daŭras rampi klopodege sub la pluvo, kun glitadoj kaj faloj, en tiuj malŝatindaj valetoj tute similaj pro la grizteraj flankoj, mi petas ke oni klarigu por mi tiun salturmenton, kies tradicio estas tre antikva.

Jen estas: deĵoras tiun tagon la barbisto de la sultano. En publika loko, prefere la placo de la vendejo, al li estas kondukata la kulpulo, fortike ligitaj. Per razilo li eltranĉas, en ĉiu mano, laŭlonge, kvar fendojn ĝis la ostoj. Etendante la manplaton, li disigas kiel eble plej multe la lipojn de tiuj sangumitaj fendoj, kiujn li plenigas je salo. Poste li refermas la manon tiel disŝiritan, enigas la pinton de ĉiu fingro faldita en ĉiun fendajon kaj por daŭrigi ĝis la morto tiel kruelegan aranĝon, kudras sur la tuto tre mallarĝan ganton bovhaŭtan, akvumitan, kiu sekigante plimallarĝigos. Post la kudrado, la turmentato estas rekondukata en la malliberejon kie, pro escepto, al li estas donata nutraĵo por adigi la suferon. De la unua momento post la sennoma suferado, li terurege pripensas,

ke neniam estos eltirata tiu kruela ganto, ke liaj fingroj rigidigitaj en la viva vundo neniam eliĝos, ke neniu en la mondo lin kompatos, ke nek tage nek nokte estos ĉeso de liaj krispoj nek de liaj doloraj kriegoj. Sed la plej terura sufero nur post kelkaj tagoj okazas, kiam la ungoj kreskante tra la mano eniĝas daŭre pli kaj pli en la karno fendita. Tiam proksimiĝas la fino...: unuj mortas per tetano, aliaj sukcesas rompi sian kapon kontraŭ la muroj.

Mi forte petas la personojn, kiujn delogas la humanaj teorioj hejme farataj, ke ili ne proklamu la kruelegecon marokana. Unue, mi igas rimarki al ili ke tie, ĉe Mogreb'o, ni estas ankoraŭ nepre mezepokaj, kaj Dio scias ĉu nia eŭropa mezepoko estis imagema kaj elpensema pri la leĝturmentoj. Poste, la Marokanoj, kiel ĉiuj homoj ankoraŭ primitivaj, tute ne atingas nian gradon al la nerva sentemo, kaj, ĉar aliflanke, ili nepre malŝatas la morton, nia simpla gilotino estus, laŭ ilia opinio, puno tute nesufiĉa, kiu atentigus neniu. En lando, kie la vojaĝoj estas tiel longaj kaj la vojoj neniel ŝirmataj, la popolon oni ne povas cenzuri, tial ke ĝi enigis en sian leĝaron ion kapablan pripensigi la montanajn rabistojn.

Laŭ PIERRE LOTI
de l' Franca Akademio.
Tradukita de E. BACQUET.

Literatura Kroniko.

D^{ro} Noel, el Nancy : Plutos', de Aristophane : Rudens', de Plaute : Esther' kaj Athalie, de Racine.

D^{ro} Vallienne, el Paris : Eneide, de Virgile.

— Tragedio, komedio, epopeo, — Esther', Athalie', Plutos', Rudens', Encide — jen la verkoj, kiujn prezentas al la esperantista mondo D^{roj} Noël kaj Vallienne.

— *Aristophane, Plaute, Racine, Virgilio*, jen la komikaj, la tragediaj, la epopeaj, la liraj verkistoj, kiuj prezentigas ĉiutempe kaj ĉiam al la tutmonda admiro.

— Kiu do diris, ke Esperanto estis nur komerca lingvo? Komerca, bone! Komika kaj tragedia, plibone! Epopea kaj lira, pli bone ankoraŭ.

— Jen unue la Komikaĵo : *Plutos'o*, de Aristophane, *Rudens'o* de Plaute. Jen Grekulo kaj Romo, niaj du patrinoj politikaj, spiritaj kaj artaj.

— La delikataj disputadoj de l' « Agora », la favora proparolado de Malriceco por la riĉuloj, por la luksaj amastinoj, por la Dioj, tiu klera kaj severa moralo estas tute mirinde tradukita Esperante. La ordinaraĵ ŝercaĵoj de la vulgularoj : rukto, ventraelpuŝo, k. t. p., estas laŭvorte tradukitaj, kaj neniel ofendas. Nova supereco de Esperanto. La franca tradukisto estas ofte devigata vuali sian francan prozon, kaj sin helpi per latinaj klarigoj. Pri tia neceseco, la esperantista tradukisto, D^{ro} Noël, estas libera. Ĉiuj legantoj profitas pri tio. La internacia lingvo estas samtempe *lingvo intermorala*. Ne sciante la grekan lingvon, oni povas legi Aristophane sur la Esperanta teksto, ĉar tio estas la sama verko.

— Jen Plaute'o, greklatinulo ; li konformigas, laŭ la gusto de Romanoj, Menandre'on. Estas la aro de la junaj beletaj sklavinetoj, de la amistoj, de la svatistoj, de la ekspluatatoj kaj de la ekspluatistoj, de la ŝtelitoj kaj de la ŝtelistoj. Okazas, ke la svatisto estas bonulo, ke la sklavineto estas estiminda, ke la ŝtelisto estas servisto de honorinda familia patro, kiu farigas, kiam malleviĝas la kurteno, la patro de tiu ĉi tuta familio. Tiu strangega detalo estas fideie reverkita per Esperanto.

— La versoj Aristophane'aj kaj Plaute'aj, ĉiam disputitaj, estas tradukitaj per esperantaj heksametroj, versoj tre flekseblaj kaj tre lerte uzitaj de la tradukinto. La silabojn longajn kaj mallongajn anstataŭas la akcentaj kaj neakcentaj silaboj. Oni sonas per la buŝo, kaj oni kalkulas per la fingroj.

Ekz. : *Ve! sorlo malĝoja! Ho, Dioj potencaj...* (Plutos).

— Post la Komedio, ni preparolu pri la Tragedio, post l' idolana, la kristana Mondo. Post Aristophane'o kaj Plaute'o, jen Racine'o kun Esther'o kaj Athalie'o.

La sanktaj himnoj anstataŭas la dusencajn ŝercaĵojn ; la longaj paroladoj anstataŭas la mallongajn respondojn.

Esperanto havas tie ĉi sukceson. La dekdusilaba verso esperanta bonege alfarigas al la dekdusilaba franca verso, pli bone ankoraŭ ol la greklatina « Iambo ».

Ekz. : *Jes, venas mi glori, en Temp' Eternulon.* (Athalie'o).

— Tie ĉi memorigu ni du pecojn ĵuste mondfamajn, kvankam malsimilajn laŭ la temo :

1/ *La Esther'a rakonto* : triumfo de l' juna kaj ĉasta beleco.

2/ *La Athalie'a sonĝo* : revo de mortigeo, de malpureco, puno de l' beleco sangavida kaj maljuniĝanta.

Dum sento terura de nokto malluma
Patrin' Jesabelo al mi sin prezentis.
Ŝi, kiel en tago mortiga, belege
Vestata, kaj malgraŭ maldolĉaj korŝiroj
Fiera, konservis eĉ brilkolorilon,
Per kiu ŝi pentris, ornamis vizaĝon,
Por zorge ripari al neripareblaj
Ofendoj de jaroj

Mi brakojn malfermis por ŝin ĉirkaŭpreni...
Sed jen nur... terura miksaĵo da ostoj,
Da karnoj ŝiritaj ; kaj meze de koto,
Karnaĵoj sangruĝaj kaj membroj senformaj,
Akir' nun batale por hundoj malsataj!..

— Jen la verko epopea kaj lira. Ĝi estas reprezentata de la famega majstro de la ĥoro, de tiu, kiun Homer'o antaŭe adoptis kiel sian filon, de tiu, kiun Dante'o salutis kiel sian patron, de tiu, kiun « Victor Hugo » respektive alvokas : *Virgilio*.

Virgilio ĉiam altiris la tradukistojn, sed ĉiuj pli aŭ malpli

iom malsukcesis. Malfacila estas la traduko ; neniu povis atingi la venkon. La francaj tradukoj estas pli aŭ malpli nekompreneblaj. Nenio, france, estas tiom teda kiom « piema Ene'o » nenio estas malpli ridiga ol tiu « honesta Turnus'o » kaj « plorema Lavinie'o ». Neptune'o kun siaj koleroj kontraŭ Eole'o, Zeŭso kaj liaj disputetoj kontraŭ Junon'o, Venus'o kaj ŝiaj delikataj ludoj kun Cupidon'o kaj Didon'o estas, vere, la nuraj personoj interes'aj de la poemo. Ni ne estas, kiel Gaston Boissier, la samtempuloj de Augusto. La sola franca traduko leginda estas la Scarron'a « *Eneide'o maskvestita* ». Ĝi reliefe prezentas la belajojn de l'originalo, kaj komike pligrandigas la nedisputeblajn malecojn. Tio estas ĉefverko de la komikema, ridigema maniero, kiu ne estas facila maniero, Tamen Scarron'o ne estas tradukinto.

La itala traduko de Caro (Karo) tre fama en lia lando estas, laŭ la opinio de Leopardi, certe bona juĝisto, kontraŭsenciga arta de la komenco ĝis la fino. Stilo fluema, belsona, tro facila ne ne povas doni ideon de la stilo de l' poeto la plej laborema, la plej dezirema al perfektega formo, de kio, kiu skribas zorgege kiel niaj G. Flaubert kaj Leconte de Lisle. Mi sentime certigas ke en la tasko pri kiu la plej bonaj francaj kaj ĉeitalaj tradukintoj malsukcesis, Esperanto sukcesas. Almenaŭ, se ĝi ne plene sukcesas, ĝi ne kompatinde bankrotas. Do tio estas preskaŭ venko. La Virgiliaj versoj estas precipe belsonaj kun netaj diferencoj. Esperanto, ne parolante pri ĝiaj aliaj ecoj, estas belsona lingvo. Tial ekzistas, por tiel diri, natura amika konsento inter la Virgilia latina lingvo kaj Esperanto.

Ekz. :

Tion dirinte, per rando de lanco li (1) montan kavernon
frapas al flanko ; kaj ventoj, tuj kiam li pordon malfermas,
kiel amaso densega, rapidas, kaj teron balaas.
Maron turnakvojn renversas ĝis ĝiaj plej kavaj profundoj.
Eŭro, kaj Noto, kaj fine Afriko, la patro ventega,
kune alflugas, kaj bordojn skuadas per ondoj larĝegaj.
Bruas samtempe sibladoj ŝnuregaj kaj viraj kriegoj
Antaŭ okuloj Trojanaĵ, ĉielon kaj lumon subite
nuboj ekkaŝas, kaj nokton nigrekan disverŝas sur maron.
Tondras polusoj, kaj brilas aero je fulmoj multegaj.
Ĉio al viroj vidaĵon prezentas minace mortigan (Eneido I).

Al la verso de l'antikva teatro, tiel estas al la « iambo » teatra kun « trimetroj » kaj « spondeoj », laŭ la ĝenerala esprimo de Horaco, sufiĉe respondas, ĉe la traduko de D^{ro} Noël, la esperantaj « heksametroj ». Al la Virgilia epopea heksametro, alia verso estis necesa. D^{ro} Vallienne prave elektis la verson deksepsilaban, kiu estas majesta kaj belsona. Ĝi taigas mirinde por la laŭlitera traduko. Unu verso por unu verso. Tio al ni ŝajnas necesega. Oni povas nur, dank'al tiu ĉi kondiĉo, savi la latinajn poetojn el la pereco. Tio estos plia servo farita de Esperanto al la literaturo.


— En sia antaŭparolo, D^{ro} Vallienne antaŭvidas la tempon, kiam la ĉefverkoj de la antikvaj literaturoj kaj ankaŭ tiuj de niaj modernaj literaturoj, Horaco, Virgilio, Danto, Victor Hugo, nur estos konataj per esperantistaj tekstoj. Esperanto estas la universala lingvo. Krom kelkaj scienculoj oni ne povas plu kontraŭstarigi la tradukon kontraŭ la originala teksto. Pro tio necese estas, ke la Esperantistoj, kun fida amo, balzamumu pieme siajn mortintojn. Niaj mortintoj estas verdire la arta kaj literatura beleco de la pasintaj centjaroj. Sekve, por ni, kiuj vivas dum la estonteco, Racino kaj Victor Hugo partoprenas en la muzeo de antikvuloj, en la sama rango kiel Homero kaj Virgilio. Estas mortintoj, kiujn oni devas ankoraŭ mortigi. Estas aliaj, kiujn oni devas revivigi se eble, dank'al la helpo de lertaj sistemoj.

Tia estas por ni, esperantistoj, nia granda zorgo. Ni estas sur la bona vojo ; ni vidos, ke ĉiuj ĉefverkoj de l' pasinto esperantiĝos. De longe, nur la instruituloj povas ilin legi. Nun ĉiuj ilin legos. Sume, tio estos pligrandigo de la homa spirito.

BUQUET,

profesoro de filozofio (Beaune).
Esp. de Anoj de « Verda Stelo ».

(1) *Eolo*.



La Telefotografio.

La scienculo, profesoro Korn, el Munchen, vidinte fotografajn, proponis al si la jenan problemon: kiel do tiun imaĝon, kiu, per la malgrandaj rimedoj de miaj sentoj, estas transsendita de la loko kie ĝi kuŝas, ĝis mia cerbo, oni povus transigi, per fortaj iloj, tra spaco, ĝis multe pli grandaj interspacoj?

Sro Korn laboris tiun problemon dum longaj jaroj, kaj ne volis ripozi antaŭ ol li estis ĝin trovinta. Fine liaj penadoj estis rekompencitaj, kaj li povis transigi ĝis 1800 km la fotografajojn, kiujn ni represas.

La aparato elpensita de la nun fama scienculo por atingi tiun celon estas ja tre simpla; oni cetere ofte konstatis, ke la simpleco karakterizas ĉiun mirindan eltrovon. Ĝi konsistas el elsend- kaj ricev- aparatoj. Ĉe la elsendloko, oni koncentras radiojn de elektra lampo Nernst, per lenso, al malgrandeta malfermaĵo farita sur surfaco de vitra cilindro, sur kiu helike malvolviĝas, kiel cilindro fonografa, la klisajo sur ŝeeto (filmo). Tiel la klisajo tuta pasas intersekve antaŭ la luma radio, kiu ĝin trapasas, kaj ankaŭ la diafanan tavolon, sur kiu ĝi estas lokita, kun forto pli malpli granda, kiam ĝi renkontas punkton pli malpli impresitan de la fotografajo. Lado de selenio, lokita interne de cilindro, ricevas samtempe radiojn *kribritajn* tra ŝeeto. Oni scias, ke la elektra kondukemo de selenio estas speciale sentema je lumo

kaj ŝanĝiĝas kun ĝia forto. Elektraj fadenoj alligitaj al tiu lado de la elsendloko estas do trairatoj de fluadoj elektraj, kiuj tradukas la ŝanĝojn de la lumo.

La ricevaparato konsistas ankaŭ el lampo Nernst, lenso kaj cilindro sur kiu impresota ŝeeto estas survolvigita. Inter la fonto luma de tiu posteno kaj la cilindro, kiun ĉirkaŭtenas la ŝeeto, estas lokita lumfermilo alligita de fadeno al la ĉirkaŭo. Oni do komprenas la funkciadon de tiu aparato: kiam fluo elektra, je ŝanĝebla forto laŭ kondukemo de impresita selenio, trairos, ĝi pli malpli fermos la lumfermilon, kiu siaflanke pasigos pli malpli da radioj lumaj de la fonto lokita ĉe la ricevloko, kaj fine malsame impresos la ŝeeton de la cilindro.


Sendube la rapidecoj de la



Kopiraĵo « Illustration »

IMPERIESTRO WILHELMO.

Portretoj ricevitaj per la telefotografio kvazaŭ je interspaco 1800=kilometra.



Kopiraĵo « Illustration ».

PROFESORO KORN.

du cilindroj turnantaj devas esti absolute egalaj; tiun malgrandan malfacilaĵon jam de longe solvis la konstruistoj de precizegaj aparatoj.

Kiam la ŝeĉeto de la ricevloko estas tiel impresita, oni devas ĝin riveli laŭ la ordinaraĵoj fotografaj rimedoj, kaj oni povas poste fari tiom da presaĵoj, kiom oni volas. Do per sola fotografiaĵo de la elsendloko oni povas elsendi al ĉiuj ricevlokoj elektran fluon, kiu donos tiom da imaĝoj, kiom da postenoj; tio estos do multege interesa por la policaj serĉadoj.

Tiu metodo, kiu donos tiom da bonegaj rezultatoj, ne estas la unua solvo, kiun estas eltrovinta profesoro Korn por solvi la demandon de la telefotografio. Jam antaŭ tri jaroj li havis similajn rimedojn malpli bonajn. Efektive, se selenio havas kapablon pligrandigi rapide sian kondukemon per lumo, ĝi perdas tre malrapide tiun kapablon; tiu igis tre malfa-



IMPERIESTRO WILHELM'O.
Portreto laŭ kiu estas ricevita la ĉi
antaŭa fotografiaĵo.

cila la transsendon de fotografiaĵo kaj tre malrapida. La plibonigo de la rimedo konsistas el la aldono de dua lado de selenio: la unua ricevas la radiojn transirintajn tra fotografiaĵo, kaj la dua, kompensilo, ricevas lumon senditan de galvanometro lokita en la ĉirkaŭo; sed la teorio de tiu kompensilo estas tro malfacila, por ke ni klarigu ĝin ĉi tie.

Sendube la aplikado de tiuj ĉi procedoj estos baldaŭ efektivigita, ĉar granda gazeto franca *l'Illustration* havas de nun monopolon de tio por ĉiu lando (escepte Germanujo), kaj ĝi promesis al sia legantaro, ke ĝi impresos post kelkaj monatoj la unuajn kliŝaĵojn ricevitajn.

Tiu eltrovo estas eble komenco de estonta eltrovo: efektive se la cilindro turniĝas laŭ sufiĉa rapideco, la transsendo de imaĝo estos preskaŭ subita, kaj tio estos la solvo de la *televidado*.

Ni atendu!



La fonomotoro.

Mi ŝuldas al Sro J. Fize, (el Pastissou, Béziers) la interesan jenan komunikaĵon, laŭ « *Le Petit Méridional* ».

« La fama Edison kutimigis nin je tiom da mirindaĵoj, ke ni plu ne devas miri pri kio ajn; kaj konvenas ke oni neniam estu skeptika, kiam tio estas nova elpensajo el lia genia cerbo.

« Antaŭ ne longe, profesoro de l' Universitato ĉe Harvard iris viziti lian laborejon, kaj samtempe lin intervjui por la profito de janka revuo. Edison interparolis kun li pri siaj komencitaj laboroj, kaj montris al li malgrandan aparaton al kiu li donis la nomon *fonomotoro*, kaj kiu efektivas tre lertan aliformiĝon de l' vibranta movo en utiligebla energio. Kiel ĝia nomo ĝin montras, tio estas motoro movata per la homa voĉo. Al la diafragma de perfektigita telefono estas alfarata ŝtalbareto, kiu per dentradaj turnas kurbdendan radon, kies akso havas movreguligilon.

« Kompreneble, la vibroj transigitaj per la voĉo al la telefona ludo movas la fonomotoron, kies movreguliga rado turniĝas tiel rapide, ke oni bezonas fortegan haltigilon kiam iu laŭte parolas en la transigilo.

« La movo de la reguliga rado povas esti utiligita diversmaniere: per ĝi oni povas turni tre maldikan rondan segilon, kaj laŭtoro de artikolo raportas, ke li segis mahagonan globon je dek diametroj centimetroj, kantante nur kvinfoje la faman himnon « *Standardo-Stelhava* ». Per ĝi oni povas movi malgrandan dinamon kaj ŝarĝi akumulatoron (amasigilon) aŭ movi viandhakilon kaj fari, dum oni parolas, bongustajn kolbasetojn.

« Evidente tio estas ankoraŭ nur kuriozaĵo sen grandapraktika utilo; kaj nur pro kvazaŭ scienca koketeco kaj por fari el sia eltrova impresgantan elmontron, Edison alfaris al sia fonomotoro la tri aparatojn ĵus antaŭe preparolitajn. Sed li deziregas fari el ĝi pli ol tio kaj pli bone, kaj li nune okupiĝas konstruante telefonan ladon je granda amplekso per kies helpo li utiligos la bruon produktatan en fabrikejo per la ronko de l' maŝinoj, tiamaniere ke ĝi estu uzata por lumigi al la laborejoj. Liaj kalkuloj provus al li la eblon atingi tion; kaj la enkonduko en la industrio, de nova forto motora, kiun ĉio konjektigas neŭzebla, « estus certe tre utila. »

Kion ni manĝas?

Kiam ni manĝas panon, ĉu ni pripensas pri la materioj per kiuj li estas farita? Laŭ panisto kiu studis, la pano estas vera ĥemia muzeo. Oni blankigas farunon per ozono, oni miksas ĝin kun aliaj farunoj, kiel fabetoj. Al la pasto oni aldonas alunon (sulfaton de kalio kaj aluminio) kiu donas al ĝi la eblon ensorbi multe da akvo, kaj karbonaton de magnesio, kiu ĝin blankigas. Iom da zinksulfato ebligas ke la pano restas longatempem kiel freŝa. Oni ŝparas fermentilon, aldonante karbonaton de amoniako, kiu ŝveligas la paston. Kiam la pano estas bakita en bakejo hejtita de ligno de disĵetaĵo, ĝi povas ankoraŭ enhavi plumbon de pentraĵo. Kiel nia stomako povas ĉion digesti?

Ne nur la panon, sed ankoraŭ ĉiujn alimentojn oni falsas. Se ni kredas la « *Cri de Paris* », ne estas necese ke oni havu specialajn konojn por iĝi ĉefkuiristo. Jen estas kiel la mastroj de malgrandaj restoracioj sciĝas, ĉu la kandidatoj estas kuiristemaj.

Al la nova kuiristo oni prezentas menuon, sur kiu estas skribita longa serio de fiŝoj, viandoj kaj ĉasaĵoj. Por efektivigi tiun menuon oni donas al li nur bovidajn, kuniklon kaj tre malkaran kaj komunan fiŝon. Se la kuiristo estas bona metiisto, li povas, per tiu ĉi sola fiŝo, prezenti ĉiujn fiŝojn. Taŭge aranĝita, fritita en porkograso, kaj alligita al kia ajn saŭco, tio estas bonega « lumbaĵo de soleo ». La partoj grasaj de la fiŝo, speciale tranĉitaj kaj ruĝigitaj per koloro, iĝas salmo.

Per bovidaĵo, li devas fari: kotletojn de kortbirdoj aŭ de ŝafido; dank al miksaĵo de glikozo kaj aliaj sciencaj aferoj, la bonegajn riĝojn de bovido.

La kuniklo iĝas, laŭ volo, leporaĵo en saŭco, spicaĵo kortbirdo, kokido en kaserolo, k. t. p.

Plie kaj precipe la ĥemist-kuiristo devas koni rimedojn por iĝi bonaj la difektajn aŭ putriĝantajn viandojn.

Kaj oni certigas, ke la klientaro de tiuj restoracioj ne plendas pri stomakdoloroj kaj ĉiam bonfartas. Eble... Ĉu ia scienculo ne verkis gravan libron por montri ke la vino arte farita estas pli bona por la stomako ol la natura!

MARCEL FINOT.



Esperanto!
 Ruĝa Kruco!
 Esperanto! celas la alproksimiĝon kaj fratecon de l' homoj.
 Ruĝa Kruco! plibonigas la sorton de l' bravulo, kiu falas vundita apud sia nacia flago.
 Ĉu tiuj du bonfaroj ne estas fratinoj?
 Zamenhof kaj Dunant celis solan aferon: *Feliĉo de la homaro.*

Jes, verda stelo de Esperanto kaj ruĝa kruco de Genève ne povas iri alie ol kunigitaj. Jam en 1902, Doktoro de Rop estis inspirita de tre interesa artikolo de la trilingva gazeto de Montreal « *la Lumo* » kiu, subskribita de afabla sinjorino de Ruĝa Kruco « *Parisienne* », predikis tiun belan kaj utilan aplikadon de Esperanto.

La simpatia Prezidanto de l' Komitato antverpena de la belga Ruĝa-Kruco, konvinka esperantisto, proponis do la saman ideon en unu el siaj elokventaj paroladoj al la antverpena Ruĝa-Krucanaro.

La opinio de tia viro estas el la plej atentindaj, ĉar Doktoro de Rop estas bravulo. Pli ol unufoje li vidis la morton apud si sur la batalempoj. Dum la franca-germana milito 1870-1871, li envicigis sin kiel ruĝa-kruca doktoro, kaj malgraŭ la pafadoj kaj multaj kuglegoj falantaj ĉirkaŭ li, li flegis la vunditojn. — Dank'al li, la nombro de esperantistoj pligrandigis inter la gesinjoroj de la belga Ruĝa-Kruco.

Poste kaj alikoke, en Francujo, oficiro pripensis pri tiu ideo kaj verkis gravan broŝureton « *Esperanto et Croix-Rouge* », kiun publikigis « *Presa esperantista Societo* », 33 Rue Lacépède, Paris.

Ĝia aŭtoro Leŭtenanto Bayol, proponis ĉe la Kongreso de Genève tagordon, entuziasme akceptitan, pri la enkonduko de Esperanto ĉe la Ruĝ-Krucajn Societojn.

— Nun, la ideo tre prosperas.

En Belgujo Ruĝa-Kruco de Antverpeno preskaŭ tuta estas esperantista. En la urboj Gand kaj Bruxelles, paroladoj estas farataj tre proksime.

Lia Serenissima moŝto, Princo de Ligne, Prez. de la belga Ruĝa-Kruco skribis al Leŭto Bayol.

« Mi esprimas al vi miajn plej sincerajn gratulojn por via laboro *kun estos pleje utila por la Ruĝa-Kruco.* »

En multaj landoj la broŝuro « *Esperanto et Croix-Rouge* » estos baldaŭ tradukata. En Japanujo: sub la aŭspicioj de la « *Japana Esperantista Societo* » kaj de la « *Jomiuri Simbun gazeto* », kaj ĝi aperos, monate, en la Ruĝ-Kruca Revuo. (*Lait letero de S^o A. Mistler.*)

Jam, en Japanujo, Generalo Barono Oku, generala Stabestro estas tute aprobinta la broŝuron kaj konsentinta pri ĝia utileco.

En Hispanujo, Generalo Markizo de Polavejia, eksministro de militaĵoj, kaj nune reĝa komisario de la hispana Ruĝa-Kruco, skribis al L^o Bayol. Ĉio, kio estas « *progreso* » min interesas. Kiel vi, mi vidas « *progreson* » en la klopodoj de tiuj, kiuj volas doti la mondon de internacia lingvo. » Do, niaj hispanaj samideanoj nun konas la simpatian de la Granda Estro, de Ruĝa-Kruco de sia lando.

En Italujo, leŭtenanto Salaris de la Milita Ministrejo, redaktis tre interesan artikolon pri tio, ĉe la militista gazeto « *Il Diritto militare italiano* »

Li estas je l' dispono de Esperanto pri la militistaĵoj kaj maristaĵoj.

Aliflanke, Dr^o Pedrazzini, Bologna, via Republicana, 8, prezentas l'aferon al la Prezidanto de la itala Ruĝa Kruco, grafo Morlacchi.

En Francujo kaj Anglujo la prospero ne estas duba, tre kredeble tiel, kiel en Unuigitaj Statoj de Ameriko.

S^o Moynier, prezidanto de la internacia Komitato de la Ruĝa-Kruco en Genève, plezurege akceptis la dediĉon de l' broŝureto « *Esperanto et Croix-Rouge.* » Ni memoru, ke S^o Moynier prezidis la faman Konferencon de kiu rezultis la Interkonsento de Genève 22^{an} de Aŭgusto 1864.

Lia aprobo estas do pleje atentinda. En Berlino esperantista Societo de l' Ruĝa Kruco estas organizata de S^o Brühl (Unter den Linden, 47^{III}, Berlino.)

Tia movado meritas atenton kaj helpon, kaj plezure ni apogus la deziron de L^o Bayol, kiu petas ĉiujn esperantistojn, ĉu izolau, ĉu grupajn, propagandi Esperanton ĉe la naciaj Societoj por helpo al la milit-vunditoj.

Plie, li petas ke oni sendu al li laŭlandan nomaron enhavantan ĉiujn konatajn Esperantistojn kiuj, dum milita tempo, estos:

1^o ricevantaj flegojn (sekve, oni donu la nomojn de esperantistaj militistoj ĉiurangaj de aktivaj kaj rezervaj armeoj).

2^o flegantaj malsanulojn kaj vunditojn (sekve, oni donu la nomojn de Esperantistaj kuracistoj, hirurgiistoj, apotekistoj flegistoj, pastroj, Ruĝ-Kruculinoj, k. t. p.)

La sekretarioj de l' diversaj grupoj diskonigu la aferon inter siaj membroj — Sendi la sciigojn al S^o Leŭtenanto Bayol en Saint-Cyr (École) France.

Vere! kian bonan propagandilon ni havos, kiam Esperanto estos tute enkondukita ĉe la societojn de helpo por la militaj malsanuloj kaj vunduloj.

Por trafi tiun celon, ni kuraĝu! ni ne timu niajn klopodojn! Antaŭen! Antaŭen!

SINDONEMULO.

*Slava la
 Cruz*

Bibliografio.

Oni povas legi, aliparte, la interesan literaturan kronikon inspiritan al klera homo de diversaj verkoj esperantistaj.

Ni donas ĉi tie pli mallongajn detalojn pri kelkaj aliaj verkoj.

Ni povas raportiti detale pri la gravaj Esperantistaj verkoj nur kiam estas eble sendi ekzempleron al speciala helpema raportanto, t. e. nur kiam ni ricevis du ekz. de tiuj verkoj. En aliaj okazoj, ni faras tion, kion ebligas al ni la tempo.

« Unua eldono de la *Esperantista Societaro* », korektita ĝis la 30^a de Junio 1906, ĵus aperis. Ĝi estas parto el serioj publikigitaj de la Esperantista Centra Oficejo. Tiuj serioj estos vasta kaj valora monumento starigita por la gloro de Esperanto kaj la utileco de l' esperantistoj je ĉiuj vidpunktoj.

Ili estas do, de nun, indaj je la tuta atento de ĉiuj samideanoj, aparte de l' agantoj, de l' societoj kaj grupoj; kaj tio ne sole pro sia graveco sed ankaŭ pro la zorgo laŭ kiu ili estos starigataj.

La plenaj serioj havos kiel titolon « Esperantista dokumentaro », kaj efektiviĝos laŭ la jena plano :

1. Oficiala parto. 2. Historia parto. 3. Bibliografia parto. 4. Statistika parto.

La *Esperantista Societaro* apartenas al la lasta serio kaj, ĉar tia etato devos esti ofte ĝustigata por esti vere utila, oni intencas publikigi duonjare novajn eldonojn, kiuj nuligos la antaŭajn.

La unua eldono estas sendita, senpage, al multaj personoj. La aliaj kostos, afr. 1 fr. 50. Ĉiuj, kiuj havos interesajn kaj plenajn sciigojn por sendi, pri la grupoj, konsulejoj, oficejoj, k. t. p., bonvolu ilin adresi, kiel eble plej frue, al la « Esperantista Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris, France.

« La antaŭdiro », komedio en du aktoj, de Charles Steward, M. A. (Cantab). Drama rakonto, bone finiĝanta, kiu ŝajnis al ni, laŭ la ekrigardo kiun ni povis nur al ĝi dediĉi, tre korekte verkita. (Sixpence ĉe Brita Esperantista Asocio, 13, Arundel street, Strand, W. C., London).

« Wilhelm Tell », la fama kvinakta dramo de Schiller, esperantigita laŭ la versmetro de la germana originalo, de L. E. Meier.

La verko, kiun bedaŭrinde ni povis nur iom traletigi pro manko da tempo, havas bonegan vidigon pri la pureco de l' stilo, kiel pri la tre rimarkinda eldoneco. Ĝi honorigas la tradukinton kiel la eldoniston (1 fr. 70, afr. ĉe S^{ro} Fritz Wenk, Albananlage, 7, Basel, Svisujo).

Eldonaĵoj de l' grupo de Nancy :

« Pri Patrujo », parolado de S^{ro} Lavisse, tr. de S^{ro} Frécut (25 cent)

« Unu jaron pli malfrue », parolado de C. Thiaucourt, profesoro de Universitato Nancy'a (25 cent).

Detale ni raportitis pri aliaj eldonaĵoj de l' sama grupo en la literaturo kroniko.

« Esperanto Manuel, Cours pratique et complet en 15 leçons », por la Francoj, de Gabriel Chavet kaj Georges Warnier, du el la plej agemaj profesoroj de l' grupo de Paris. Tiu lernolibro estas tre bone ellaborita kaj estos certe tre utila al multaj profesoroj kaj lernantoj.

Reĝo Eduardo VII^a akceptis favore verkojn esperantistajn de nia amiko D^{ro} O'Connor. Sur sia letero, transsendita de sia privata Sekretario (Lord Knollys) li diras, ke li estas ĉarmata eksciinte ke Esperanto celas la bonon por la homa raso, kaj li deziras al ĝi, kaj al S^{ro} O'Connor, la plej grandan sukceson.

El « *The Daily Mail* ».

« Nia ŝatata kaj bonega kunfrato « Belga Sonorilo » duonmonatiĝis, kaj aperas nun la 5^{an} kaj 20^{an} de ĉiu monato. Ĝi estos direktata de nia distinginda samideano K^{to} Lemaire, kiu, dum sia nova vojaĝo « Tra Mez Afriko » restos en interrilato kun ĝi, koresponde, kaj sendos regule novaĵojn pri siaj laboroj kaj esploradoj. Korajn sukcesajn dezirojn al la gazeto kaj al ĝia direktoro.

Nia problemisto Warden, malavare deciĉas al la blinduloj esperantistaj la premion je 5 fr., kiun li gajnis pro nia lasta konkurso. Ni enskribas ĝin en la monoferon por la helpinda verko de nia amiko Th. Cart. pri kiu ni parolos en nia proksima numero.

« Esperanto Leitfaden », germana propagandilo tre plena kaj malkara por komencantoj aŭ por personoj, kiuj ne povas dediĉi multe da tempo kaj mono por la lernado de Esperanto (20 pfenigoj, ĉe Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, Germanujo).

« Verba amuzaĵo » en kiu la aŭtoro, nia kunlaboranto, esperantisto n^o 10.072, tre plaĉe ludas kun la konjugacio de l' verbo *ami*, bonega maniero ĝin instrui (0,10 pesetoj, 10 ekz. por 1 fr., Avellanas, 7, Valencia Hispanujo).

De l' sama aŭtoro : « Cent dek tri humorajoj » (0,40 pesetoj).

« Die Esperanto Sprache », germana eldono de « La langue Esperanto » kaj « The whole Esperanto », de nia nelacebla amiko Ĉefeĉ (zeln pfennig, ĉe l'aŭtoro, 45 Christchurch Rd., Streatham, London, W. C., aŭ ĉe Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin).

« Frazologio rusa-pola-franca-germana » de M. F. Zamenhof, kun Esperanta aldono : « Proverbaro Esperanta », kajero 3a. Ĝi estas tiel interesa kiel la du unuaj.

Esperanto-Journal. La ekŝigo de S^{ro} Berthelot, eks-administranto, alvokita en Sud-Amerikon por fari paroladojn kaj kursojn pri Esperanto, povis timigi pri la malapero de l' ĵurnalo.

Ni ĵus eksciis, ke la ĵurnalo baldaŭ reaperos, starigita sur tute nova fundamento ; ĝi estos speciale la organo de la konsuloj, oficoj kaj poresperantaj societoj, kaj aperos sub la direkto de S^{ro} H. Hodler, kies talenton povis ŝati niaj legantoj.

Ni tre forte konsilas la legadon de tiu ĵurnalo, kiu aperos dum la februara monato. Premioj estas promesitaj al la legantoj.

S^o Fritz Schuck, kiu verkis la nun faman albumon de l' konataj esperantistoj, kiun multe da kongresanoj plenigis, dum la kongreso, per subskriboj de l' ĉeestantaj konatuloj, intencas eldoni monatan kvarpaĝan folieton sub la titolo « La Albumo ». Tiu folieto enhavus 3 aŭ 4 portretojn kun bibliografio, grupajn fot., kaj kostus jare 1 fr. 90 c. Li petas tiujn, kiuj favore rigardas la ideon, sin turni al li kiel eble plej rapide.

Ni uzas tiun okazon por instigi aĉeti la « Albumo de l' konataj esperantistoj », kiu devus havi lokon en ĉiuj grupaj bibliotekoj. (S^o Fritz Schuck, 13 I Thomastrasse, Braunschweig, Deutschland).

LEGADAMIKO.

Ni ricevis ankoraŭ multajn aliajn verkojn, pri kiuj estos parolata pli poste.

Ni volas tamen de nun citi, atendante la raporton meritatan, la novan volumon de nia amiko K^{to} Lemaire : « Tra Mez-Afriko ». Ĝi estas, presita, la rimarkinda parolado farita, dum la kongreso de Genève, de l' unua pioniro esperantista en Belgujo, ankaŭ pioniro de la civilizacio en Afriko.

Kiam aperos tiuj linioj, Komandanto Lemaire estos denove veturanta al Mez-Afriko, kiel kongra komisiisto por la limigado de l' 30^a meridiano orienta, Greenwich.

Ni deziras feliĉan vojaĝon al nia samideano, kiu fierigas kune sian landon kaj la duan, senliman, patrolandon de ĉiu el ni, Esperanto-landon.

A. MONTROSIER.

Nia enketo pri edukado.

Ni komencos en nia venonta numero nian enketon pri edukado : 13 landoj respondis al nia alvoko, kaj la ŝtofo, tre varia, estas pleje interesa. Ni do tre atentigas niajn amikojn kaj petas ilin konigi la enketon al tiuj el siaj gerespondantoj, kiuj estas edukistoj aŭ interesigis pri la eduka kaj instrua demando.

La raporto verkita de nia bonega kaj klera kunlaboranto, P^{ro} Th. Rousseau, komencos en la februara numero.

Ĝi estos bonega armilo por la propagandistoj, montrante praktikan, aplikadon de Esperanto, pleje interesan por ĉiuj, kaj precipe por la gedukistoj, kies atenton oni bonvolu altiri al la raporto. Oni mendu TUJ la deziratajn numerojn.

TRA LA MONDO.


Knabina vivado en Japanujo.

Unu el la fakoj, kiuj estas ĉiam priinstrutataj en knabinaj lernejoj (sed ne en knabaj lernejoj), estas la sociala ceremoniaro. Per la ĉi suba fotografaĵo oni vidas la instruon pri la fama japana ceremonio, kiun devas tre bone koni ĉiuj bonedukitaj sinjorinoj. Estas treege malfacila kaj kompleksa ceremoniaro, kiu estas kelkfoje uzata dum solenokaza tetrinkado. Ĉiu movo, eĉ la plej malgranda, estas rigide

priordonita, kaj oni uzas specialan teon, specialajn tefarilojn, specialajn kukojn, specialajn vazojn, eĉ se eble specialan ĉambron. En la fotografaĵo oni vidas du knabinojn sidantajn laŭ la japana maniero kun la tetasoĵoj antaŭ si, kaj unu knabinon prezentantan la kukojn.

(Daŭronto).

C. STEENBUCH.
Japanujo.



Kopirajto.

INSTRUO PRI LA FAMA JAPANA SOLENOKAZA TETRINKADO.

La Harakiri' — Karakteriza japana kutimo.

Ĉiu Japano estas preta por morti por sia patrujo, kio kunhelpas por igi lin perfekta soldato. Sed kio estas la plej eksterordinara, estas ke la Japano konsideras la morton kiel tiel natura afero, ke, tre ofte, li ne eĉ provas ĝin eviti. Kvankam mi tre admiras la perfektan fanfaronadon de la oficiroj kaj de la soldatoj kiam ili mortigas sin, mi demandas min ĉu, eĉ por utili al sia patrujo, ili ne pli bone agus ŝparante iom plie sian sangon. Morti por sia patrolando estas nobla ago, sed estas necese, ke tiu ago estu utila. Kiam Japano mortas, ĝi estas iom da Japanlando mem kiu mortas. Oni devas ĉiam pensi, eĉ kiam oni militadas, ke ĉiu homa vivo utilas al la patrujo, kaj ke ĝi profitas de la ofero de tiu ĉi vivo, nur kiam la utilo de tiu ago povas kompensi la oferon. Certe estas senutile inspiri tiujn pensojn al la militisto, ĉe kiu ili povus neniiĝi necesegan entuziasmon, sed ili ĉiam devus direkti la agojn de la ĉefaj militistestroj, kiel ankaŭ tiujn de la responda registaro.

La Japanoj, individue kiel ankaŭ ope, ne sufiĉe kalkulas pri la valoro de la homa vivo; la malmulto pro la morto estas vere trograndigita ĉe ili.

Ili tro konsideras ĝin kiel la finiĝo de mizera vivo, kaj, pro tio mem, senigas la oferon de sia vivo, je la

vera heroeca karaktero, kiun tia ofero devas enhavi. Japano stoike mortas nur tial, ke morti ne estas por li grava afero. Tiu ĉi estas vera heroo, kiu fervore amas la vivon, kaj tamen ĝin ofertas pro sia devo. Tiel ne okazas por la Japano. Nepre la Japano admiringe kaj pro nenio mortas, pro la plej malgrava preteksto, la plej malgranda ofendo al sia memestimo kaj al sia honoro, sed mi opinias ke, kiam li mortas, li ne sufiĉe bedaŭras la morton por ke tiu ago estu vere grandioza. Kuri renkonte al la morto estas por kelkaj Japanoj elegantaĵo, por la pli multo, komunaĵo, por tre malmultaj vera ofero.

Studante la historion de Japanlando, oni estas vere frapita de la malŝato, kiun ĉiam havis la Japanoj por la homa vivo. Ili ŝatis nek la amon, nek la kompaton, nek la idealajn ĝojojn, nek la superegajn esperojn ĉu diajn, ĉu artajn, kaj pro tio, ili senbedaŭre mortas, kiel, sen konscienciproĉo, ili mortigas. Ilia propra vivo, kiel tiu de iliaj samuloj ŝajnas al ili nur pli malpli triviala fantazio, kiu nur estos meritinda, dank'al sensacia morto.

Pretaj por malfermi sian ventron kun drama fanfaronado, ŝajnas al ili logike agi tiel kruele pri siaj malamikoj, se feliĉe ekspluatante ilian vantecon, oni ne estus sukcesinta konvinki ilin, ke ili tre riskus

esti konsiderataj kiel la plej sencivilizaciaj sovaĝuloj, de la aliaj pli sentemaj nacioj (pli senkuraĝaj, diras la veraj Japanoj).

Reale tiu kutimo malfermi sian ventron neniel malaperis.

Kiel antaŭe, publika respekto estas nun certigata al ĉiuj tiuj, kiuj praktikas la Harakiri'on.

Antaŭ nelonge mi aĉetis popularan figuraĵon freŝe eldonitan, kies vera heroo estas maristo, kiu malferminte sian ventron, skribas siajn lastajn volojn per sia fingro trempita en la sangon. Tiu figuraĵo estas tre verŝajna.

Oni tute oficiale scias, ke la plimulto el la militistoj kaj maristoj de « *Kinshumaru* », la japana transportŝipo dronigita de la Rusoj, preferis malfermi sian ventron ol kapitulacii. Mi aŭdis citi ankaŭ multajn Harakiri'ojn izolitajn, ĉu ĉe la militistoj, ĉu ĉe la civiloj por diversaj honoraferoj.

Dum la nuna militado certe multenombraj estis la Harakiri'oj. Multaj militistoj pli amis malfermi sian ventron, ol toleri ofendon al sia memestimo; mi opinias, ke la Rusoj ne rekondukis multajn militkaptitojn. La japanoj batalados ĉiam ĝis la lastaj penadoj, kaj la postvivuloj ĝenerale pli amos la morton ol la honton de la malvenko, aŭ de la militkaptiteco.

Tiu stranga kutimo, Harakiri, pri kiu mi ĵus parolis, kaj kiun oni malrajte kredas tute neniigita, naskiĝis en tiel antikva epoko, ke oni ne povas certigi ĝian devenon. Kiam oni studas la historion pri la antikva Japanlando, oni nur rimarkas ke ĉiuj herooj instigitaj memmortigi sin pro kaŭzo konsiderita kiel nobla, ĉiam elektis la Harakiri'on por pligrandigi sian gloron.

La Harakiri estis fariĝinta speco de privilegio speciale postulata de la nobelaj klasoj; tamen kutime la servistoj de altranga sinjoro, kiel rekompenco pro siaj fidelaj servoj, povis malfermi sian ventron kiam tiu mortis.

Tiu herooa memmortigo estis tiel ŝatata de la nobelaro, ke ĝi kutimis zorge serĉi pretekstojn pri ĝi; cetere ĝi estis certa rimedo por nobelo, garantianta la honoron, pravi sian raspurecon kaj sian perfektan edukitecon.

Altranga sinjoro ne malfermis sian ventron kiel vulgarulo, kiu cetere ne havis tiun privilegion.

Nur la altranga sinjoro, pro sia riĉeco, sia naskiĝo, kaj siaj altaj interrilatoj, povis ĉirkaŭi la Harakiri'an « ceremonion » per ornamaĵoj taŭgaj al la etiketaj reguloj kreitaj de centjaraj tradicioj.

Kelkaj el Daimjos'oj sciis morti laŭmaniero, tiel kuraĝa kaj tiel eleganta ke ili kaŭzis veran ĵaluzecon ĉe la ĉeestantoj, kiuj, tuj, serĉis pretekston por ilin imiti.

Tia preteksto estis facile trovebla: simpla ektuŝeto de glavingo estis konsiderata kiel ofendo, kiun oni povis nur purigi per la sango. Unu do el tiuj nobeloj mortigis alian kaj havis la kontentiĝon elpagi tiun mortigon per la Harakiri. Mi diras *kontentiĝo* ĉar la Harakiri'a ceremonio estante ĉiam publika, ĝi estas la plej bela okazo por montri al siaj amikoj, kun drama fanfaronado, ke oni estas vera nobelo.

Ĝenerale la ceremonio daŭris sufiĉe da tempo, ĉar ĉiuj gestoj de la precipa aktoro, tio estas tiu kiu estis malfermonta sian ventron, estis reguligitaj laŭ

vera legio da etiketaj leĝetoj, ĉio estis detale reguligita: la maniero laŭ kiu li devis eniri la ĉambron, tute blanke tapetitan (tio estas la funebra signo en Japanlando), la maniero laŭ kiu li devis respondi al la salutoj de siaj amikoj kaj de siaj invititoj, kaj tio devis daŭri longatempe se oni tion juĝos laŭ la senfinaj ĝentilecaj salutoj, kiujn ankoraŭ nun la Japanoj interŝanĝas. Poste, kun la rideto sur la lipoj, li sidigis sur siajn kruojn kaj malkovris sian ventron. Tiam por montri samtempe sian kuraĝon kaj sian bonedukitecon, li devis, antaŭ ol frapi sin, elparoli kelkajn virajn kaj elegantajn frazojn; li finis per tiu, kiu ŝajnis al li plej bela, turnante sin al sia plej intima amiko, kiu, staranta apud li, kun akriĝinta glavo en la mano, havis la ŝatindan honoron mortigi lin senkapigante lin. Fine, post la plenumado de la necesa ceremoniaro, li malfermis sian ventron de la dekstra al la maldekstra flanko, kaj, tiam ankoraŭ, li devis montri, ke li estas purrasa, tio estas agi tiel distingiĝe kiel kuraĝe. Preskaŭ tuj, cetere, la amiko mallongigis liajn dolorojn, detranĉante lian kapon per unu bato de glavo.

Kelkaj Harakiri'oj restis famaj en Japanlando, ekzemple la Harakiri' de kvardek sep Ronin'oj. Ili plenumis ĝin sur la tomo de sia sinjoro kaj mastro Daimjo Assano, venginte lin senkapigante lian malamikon, Ministron Kira.

Oni povas trovi en multaj japanaj rakontoj tutajn detalojn pri tiu Harakiri' de la kvardek sep Ronin'oj, kiu sufiĉe sintezigas multajn aliajn Harakiri'ojn. Fine oni povas legi la raportojn, tute oficialajn kaj eŭropeanajn, pri la Harakiri' de Zenzaburo, kiu plenumis ĝin, multaj Eŭropeanoj ĉeestantaj, en la 1868^a jaro, pro la ordono de Mikado, tial ke li estis ordoninta la pafadon kontraŭ la fremduloj en Kobe'o.

Vere, kvankam la nova japana leĝaro malpermesas la Harakiri'on, malpermeso malfacile respektigebla, tiu sanga kutimo ne jam malaperis el la japanaj moroj, kaj nenia tribunalo kuraĝus uzi la severajn punojn leĝajn por ĉeestanto de Harakiri.

La Harakiri' longatempe ankoraŭ restos honorata ĉe la japanaj kutimoj. Tiu antikva privilegio de la nobelaro ĉiam estos postulata preskaŭ kiel rajto de la militistoj, kiuj estas ĝia idaro. Se la oficiala Japanujo, teorie, malaprobas tian kutimon, tial ke ĝi estas devigata pri tio, pro sia elmonro de okcidenta civilizacio, estas vere tamen, ke, praktike, tiu ĉi Japanlando konservas admiron preskaŭ sanktan por ĉiuj, kiuj nuntempe plenumas la Harakiri'on, tiel montrante ke ĉiu Japano preferas morton eĉ teruran, pli ol la plej malgranda makulo por sia honoro. Ĝi estas cetere la vera honoro, pri kiu la Japanoj havas ideojn identajn al la niaj; eĉ oni povas diri, ke ili ne komprenas multe da aliaj. Tial la Harakiri nur efektiviĝos por motivoj je kiuj la armiloj partoprenas, kaj tiel estos, tiom, kiom la Harakiri daŭros, tio estos tiom, kiom la animo de la antikva Japanlando, kiu nun estas devigata kaŝi sin, sed kiu ĉiam ekzistas, vivigos per sia grandioza sovaĝeco, tiun popolon, kiu neniam havis alian kulton, krom tiu de la armiloj.

Verkita de CHARLES PETTIT
« *Le Temps* »

Tradukita de S^o DIFFRE PAUL
Constantine.

La misteraj piloloj de doktoro Kohol

Stranga historio, de HANS ROMANOWICZ, Wien (Austrujo).

Kiam mi malsupreniris la difektitan ŝtonan ŝtuparon, per kiu oni venis en mian malgrandan ĉambron, estis malgaja pluvema vetero.

Monatoj post monatoj estis pasintaj, sed mi ne sukcesis, ke ia redakcio akceptu almenaŭ la plej malgrandan el miaj laboroj; mia espero tute estis malaperinta. Ne paginte la luprezon de neekalkulebla tempo, mi apenaŭ riskis paroli mian mastri-non.

Senbrue, tute senbrue mi vespere iris al mia loĝejo, falante sur la disŝiritan matracon laca kiel mortanto, direkte al la okulojn al la nudaj muroj, turmentante mian bedaŭrindan kapon. Vane! La lacega cerbo ne povis plu pensi, la malsato pelis ardantajn torentojn de febro tra mia malforta korpo; nenia helpo!

Mia konataro jam de longe estis doninta ĉion al mi, de kio ĝi povis senigi, sed ho! ili ankaŭ estis malriĉeguloj!

Hieraŭ mi estis portinta surtuton kaj veŝton al ĉifonaĵisto, konsiderinte ilin kiel superfluan luks-on; kelkajn helerojn mi estis ricevinta.

Kun ia stranga, malesperanta gajeco mi sonigis miajn helerojn en poŝo, suprenirante la ŝtupojn.

Malvarmega akra vento blovis tra la stratoj, jetante pluvgutojn kontraŭ mia vizaĝo.

Frosttremante mi sencele forkuris, zorge metinte eluzitan palton, terure ĉifonitan, ĉirkaŭ mia korpo. Nebulo estis malleviginta sur la noktan teron, ĉirkaŭprenante la gasflamojn per fantomaj, haladzaj brakoj. Kiel senkonsole kaj malgaje lumetante, ili rigardis malsupren, kvazaŭ estante malsataj almozpetuloj elstreĉantaj al mi la tremantajn manojn.

« For de mi, mi nenion povas doni al vi; kion povas doni al vi malriĉegulo!? »

« Panon, panon! » tiel, ŝajnis al mi, petegis iliaj plorantaj voĉoj.

« Panon, — panon! » io kriegas en mia brusto; mi falis en feliĉegan ravecon.

Mi imagis kiom da pano mi povus aĉeti per mia mono; kiel mi tiam, preninte poŝan tranĉilon, detranĉus tute malgrandan peceton de tia belega pano.

Longatempe — longatempe, mi ĝin rigardus, englutante ĝin poste kun furioza avido.

Nun, alveninte al panbutiko, mi rigardis per avidaj okuloj la delikatajn panbulojn. Kiel pentrinde ili ĉi tie kuŝis en blanka lumo; ilin vidi estis vera plezuro!

Mia fantazio tute senkateniginta, eksaltis sovaĝe...

Kiam mi iam ree gajnos monon — tio do certe okazos — tiam mi aĉetos panbulojn; centojn, milojn da panbuloj, tutan aron da panbuloj mi aĉetos.

Jes, jes, ne rigardu min tiel moke, ĉiujn mi aĉetos.

Mi mem, mi sidos meze de vi manĝante rostajon, trinkante vinon. Vi petos kaj plendos, sed mi ne mangos vin, ne!, ĉar mi tiam estos riĉa, sata, kaj vin fordonos al la musoj!...

Tiel mi longtempe staris premante mian varmegan frunton kontraŭ la malvarmeta fenestra vitro, malantaŭ kiu kuŝis la panbuloj.

Jen iu pasis, min maldolĉe ŝovante flanken. Tuj mi ekvekiĝis el mia revado. Mi pripensis ĉu mi eniros la butikon por aĉeti panbulon. Terura batalo ekkomencis en mia animo.

Fine mi decidis ankoraŭ atendi por pligrandigi mian finan ĝojegon manĝi

tian belan, delikatan panon.

Mi nun baldaŭ troviĝis en malhelaj malpuraj stratoj. La homoj, rapidirantaj kiel ombroj sur la malglata nezorgita pavimo, jam pli similis al mi en sia ĉifonita vestaĵo.

Jen, en la fino de la strateto, briletis lumo tra la fenestraj vitroj de fumplena drinkejo. Mi ekhaltis, rigardante en la internajon. Tra la fumo kaj haladzo mi apenaŭ povis distingi la staturojn de kelkaj duonebriaj laboristoj; ili kriegis per raŭka voĉo ian maldelikatan kanton.

Ankaŭ fortepiano staris en la fundo, terure maldika homo sidis antaŭ ĝi, hakante sur la klavojn per siaj flavaj araneaj fingroj. Odoro de kruda brando disvastiĝis ĝis en la strato, incitante miajn sentojn.

« Kiel estus », mi pensis, « se ci enirus por iom ripozi? »



Anton Raschka, Wien.

Kopirajto.

Nun, alveninta panbutikon, mi rigardis per avidaj okuloj la delikatajn panbulojn.

Kaj subite mi sentis laciĝon.

« Nur malgrandan glason da brando mi trinkus por varmigi min; estas sensignifa afero ne inda multajn vortojn »

Mi eniris!

Mi eniris, sidigis ĉe malgranda tablo, kaŝita en angulo, postulante glason da brando. Oni alportis ĝin kaj mi tuj eltrinkis preskaŭ la tutan enhavon.

Agrabla varmo trafluis mian korpon, mi etendis plaĉplene la rigidajn membrojn, mia humoro baldaŭ fariĝis pli bona.

« Bonan vesperon! » ia voĉo diris al mi. Mirigita, mi levis la okulojn. Ĉe la tablo subite sidis pala malgrasa hometo en nigra vestaĵo, kiel subite elsaltinta el la tero.

Maldikaj grizaj bukloj ĉirkaŭis vizaĝon, kies mieno senĉese ŝanĝiĝis. Unufoje ĝi havis severajn trajtojn, tiel ke mi ŝajne vidis abaton antaŭ mi, aliafoje subite venis moka rikano detruanta la unuan impreson.

Mi konfesas ke teruro min ekprenis pro tiu okazintaĵo.

« Bonan vesperon! », mi fine respondis per ŝanceliĝanta voĉo. « Estas abomena vetero hodiaŭ », diris la hometo per pepanta voĉo.

« Jes, jes! » mi konsentis, « la vento ŝajne elblas animon el korpo! »

« Pro kio vi ne vestis vin pli varme, mia karulo », ridis la fremdulo blekvoĉe kiel kapro.

Mi eksaltis kolere kun hontruĝa vizaĝo, dezirante rompi al ĉi tiu diabla moka vireto la filigranajn ostojn.

« Ho, trankviliĝu, estimata sinjoro! » li rapide ekkriis, « mi tute ne volis vin ofendi! » La moka rideto malaperis. « Mi bone scias, ke vi ne apartenas al la riĉuloj de nia tero, kiuj povas aĉeti zibelan pelton. Ne, vi en bona okazo trinkas glason da brando, nu, ĝi estas bona trinkaĵo varmiganta la korpon bonege! »

« Kelnero! » li ekkriis malgraŭ miaj kontraŭdiroj « al ĉi tiu sinjoro ankoraŭ unu glason da brando! »

Eltrinkinte la helan fluidaĵon, mi tute perdis la timon kaj diris malrespekte:

« Diru al mi, estimata sinjoro Nigrasurtutulo, pro kio vi vagadas en ĉi tiuj malbonodorantaj drinkejoj, vi tute ne havas aspekton de malriĉa homo, sed kontraŭe mi vetas ke vi eĉ estas bienhava homo! »

« Por studi, karulo, por studi! » li murmuretis per mistera voĉo. Mi, sciu, studadas tiun malnaturan gajecon produktitan per la alkoholo ĉe la homoj. Mi jam estas esplorinta ĉampanan ebriecon kaj tiun kaŭzitan de la aliaj vinoj kaj likvoroj, nun mi estas ĉe ordinara kruda brando. Mi kredas ke ĉi tie estas la plej konvena loko por tiu esploro?

Sed hodiaŭ mi finis miajn studojn, la granda belega eltrovo estas farita!

Mirigita mi rigardis la malgrandan karteton, kiun la fremdulo prezentis al mi:

Dro Kalmus Kohol

Eltrovinto de la misteraj piloloj.

Subite, kiel fulmo, la penso trakuris mian kapon:

« Jen, vidu frenezulon! »

« Vi eraras, mia karulo » moke diris doktoro Kohol, « mi tute ne freniziĝis, sed mi scias, ke oni ĉi tere komence rigardas la eltrovintojn kiel frenezuloj! »

Kiam mi hontanta mallevis la okulojn, li daŭrigis la paroladon kun entuziasma mieno:

« Prosperis al mi fari grandegan eltrovon; vi estos la unua, kiun mi ĝin sciigos. Imagu, ke estinte iam bienhava homo kun bela pozicio, vi estas forĵetita de la kruela sorto en la palajn brakojn de la malriĉeco, imagu, ke vi, ĉiutage, pli profunde eniĝas en la malgaja marĉo de la mizero.

La terura malo inter la tiama kaj la nuna vivo turmentegas vin, konsumas vian faremecon, preskaŭ mortigas vin.

Fine vi ne povas plu suferi ĉi tiun staton, vi serĉas ilojn por sufoki la frenezigitajn pensojn. Havante nur iomete da mono vi nur povas aĉeti ordinaran krudan brandon, fariĝante ĉiutaga gasto de ia malpura drinkejo. Nevenkebla sopirado ĉiam tiras vin al brando, vi trinkas — la mordanta doloro iom cedas. Vi ree trinkas, ĝi tute malaperas, ia stranga gajeco ekprenas vin. Baldaŭ vi petolas pro gajeco kriante: « Vivo do estas belega! »

Iom post iom tamen kvietigas via humoro, vi iĝas dormema, apenaŭ vi povas palpebrumi. — kiel plumba kovrilo malleviĝas la dormo sur vin, vi falas sen konscienco teren. Kiel farte vi vekigas?

Viaj membroj ŝajnas al vi rompitaĵoj, apenaŭ vi povas movi ilin, vi havas kapdoloron, via farto estas malbonega! »

« Imagu » li daŭrigis plilaŭtvoĉe, ke oni povus fabriki pilolojn laŭ certa ĥemia procedo, kiu havus la mirindan econ venki ĉiujn malsanojn de l' korpo kaj de l' animo. Ĉu ne estus belega eltrovo?!..

Nu! — Ĝi estas farita, ĝi jam estas farita!!

Ĉe ĉi tiuj strangaj vortoj min ekprenis kapturono, ŝajnis al mi ke mi sonĝis.

« Ĉu vi eble volas ilin provi? » diris la nigra homo eltrivante rondon skatoleton el poŝo; kelkaj piloloj enkuŝis tiel grandaj, kiel pizoj.

Li ŝovis unu el ili en mian buŝon. Ĝi havis agrablan, dolĉetan guston, disfluigis kiel sukero. La stranga ŝanĝiĝo okazis, la dolora premo en mia kapo malaperis, miaj pensoj liberiĝis, klariĝis, ia dia sento de feliĉo trakuris mian korpon.

« Doktoro! » mi ekkriis, « via eltrovo estas la plej granda jam farita de homo: vi sukcesis efektivigi la vuan sonĝon de la malnovaj alĥemiistoj, trovi universalan kuracilon por ĉiu malsano.

Viaj piloloj faras el la tero paradizon! »

La Nigrulo ridetante aŭdis tiun eksplodon de mia ravo, alŝovis al mi la skatoleton, dirante:

« Ĉu vi vidas inter la blankaj piloloj la bluan, jen en la mezo? Enhavanta la plej fortan el konataj venenoj, ĝi tamen devas resti en la ujo, alie la blankaj perdus sian mirindan econ. Estas tiu venena kugleto, kiu donas al la aliaj la sanigan econ. Ĉar ĝi estas egalgranda (pro gravaj kaŭzoj), havas la saman vidiĝon, nur je la koloro oni povas ĝin distingi el la ceteraj.

Daŭranta.

Originale verkita kaj ilustrita por

« Tra la Mondo »

de HANS ROMANOWICZ kaj ANTON RASCHKA.

FELIETONO

Posta Amo.

Hispana, de JOHANO MUNOZ KAJ PABO'N, Noveleto.
Tradukita de JOHANO GARCIA MARTIN, el Ubeda (Hispanujo). (*)

Al F^{ino} Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Jes, mi iros, jes, eĉ se mi devos naĝe trapasi la oceanon kaj genuetrajri la Saharajn dezertojn. Mia amo estas forta kiel morto, kaj scios transiri ĉiujn malhelpaĵojn kaj barilojn. Tamen, nenion timu pri mia alveno. Mi tre bone scias, ke la amon oni neniel postulas, sed ĝin meritas kaj mi, verŝajne, ne meritas bedaŭrinde la cian. Sed mi volas ĉin vidi, mi deziras al ci paroli kaj poste morti. Ĝis la vido, adiaŭ. Cia malfeliĉa frenezulo.

19, X, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia bona sinjoro kaj ofendita amiko: kion mi faris kontraŭ vi, oni neniam devas fari; sed, mi petas, pardonu min pro mia konduto. — Mi estas Petro Lasso, pastro de Ajnvilaĝo kaj onklo de Mario, kiu estas jam delonge fianĉino de Inĝeniero de arbaroj. Fraŭlino Mario troviĝas en Seville de tri tagoj antaŭ via unua poŝtkarto. Mi estis do la pseŭdo-Marijo. Tial ke vi, en la komenco, petis nur interŝanĝon de kelkaj poŝtkartoj, mi tre volonte kaj plezurege komencis respondi al vi, tiel multe por vin plaĉi per senriska afero, kiel por kontentigi la fraŭlinon, kiu, je sia reveno, plezure vidus plimultigitan sian kolekton da poŝtkartoj. Post kiam mi komencis la ŝercon, mi rimarkis ke vi havas animon tre pasiplenan kaj tre belan, kaj sekve tre eman por la bono; pro tio mi penadis kiel eble plej senlace por sukcesi profiti ĝin por Dio. Mi tute ne bone kondutis, mi konfesas, ĉar mi agis senĝene kontraŭ vi, kvankam la rezultato estas profita por via spirita bono. Pardonu min, almenaŭ memorante la sindonan amon, kiun vi portis al mi, aŭ punu min laŭ via volo; ĉar vi estas rajtigita ĝin difini kaj mi preta fordoni tiom da kontentigoj, kiom vi postulos da ili.

Ĉu vi fordonos senpagan pardonon, ĉu vi difinos merititan punon, havu la bonecon kaj faru al mi la plezuron akcepti por ĉiam la sinceran kaj puran kaj malprofiteman, kvankam senutilan, amikecon de tiu ĉi humila servanto, kaj amiko kaj frato kaj patro kaj..... ĉio, kion vi deziros, krom fianĉo.

21, X, 1905.

PEDRO LASSO, PASTRO.

Al S^{ro} Pastra Moŝto, Petro Lasso, *Ajnvilaĝo*.

S^{ro} Don Petro Lasso, imagita amatino mia. Ni do finu, viro, ni do finu

Nenio! Mi hontas pro ŝerco, kiun al mi kaŭzis mia *poŝta amo* kaj mi tute ne scias ĉu mi devas memmortigi aŭ ridegi. Tamen, Sinjoro, nenion mi devas al vi pardoni, kaj pri nenio mi devas min venĝi al vi. Vi ne trompis min, sed mi mem tion faris, ĉar, relegante nun viajn poŝtkartojn, klare mi rimarkas ke vi, de la komenco ĝis la fino, forte kontraŭbataladis kaj havis la tutan senkulpecon de Vesta'ulino kun barbaro Fi! fi!

Mi sincere certigas ke alia pli lerta ol mi estus kompreninta la ŝercon, vidante tiom da klereco kaj spriteco ĉe fraŭlino, kaj je la kvina aŭ sesa poŝtkarto estus alveninta tien por paroli al fraŭlino tiel malica, evitema kaj malŝatema. Senkulpigu min pri la dua (la alvenado tien) la prudenta timo malplaĉegi al mia Ofelio aŭ mia Ajdo pro... (kredu al mi, eĉ la diro pri tio min hontigas, sed fine mi ĝin diros, ĉar ĝi estas nenia krimo).. malbenita favo, kiu min kaptis ĉe perukejo ĉirkaŭ la unuaj februaraj tagoj, kaj kiu devigis min tondigi mian hararon, ĝis la radiko razigi miajn lipharojn kaj fari mi ne scias kion pluan kontraŭ mia *senartika beleco*. Kriminale estas ja, ke ĉe perukejoj mankas desinfektaĵoj! — La babilajoj de miaj poŝtaj kartoj kaj la minacoj tien iri estis, por diri al vi la veron, simplaj parolantaj rimedoj; mi ne estas, kaj en la daŭro de almenaŭ du monatoj mi ne estos, preta montriĝi antaŭ la okuloj de virino eĉ meze bonŝatema. Feliĉe, malsano pasas. Ŝajna nova harnaskiĝo komencas. Dio estu benita!

Tial ke ĉiu malbonaĵo antaŭiras iun bonaĵon, iom da bonaĵo mi ĉerpis el ĉio tio ĉi: nome fariĝi amiko de Dio (kion mi tre bezonis, estu dirite parenteze) kaj ankaŭ gajni la tre honorigan amikecon de pastro tiel simpatia, kiu, eĉ en simpla ŝerco, havas antaŭ siaj okuloj sian dian mision. Vi obstinis min devigi ami la bonecon pro la boneco mem kaj vi bone sukcesis..... Tion al vi Dio pagu.

23, X, 1905.

KAROLO VERGARA.

Antekera, la 3^{an} kaj 4^{an} de Aprilo 1906.

JOHANO GARCIA MARTIN,
(Hispanujo).

(*) *Fino*. (Vidu la Nojn 2an, 3an, 4an, 5an kaj 6an).



La Modo, de Roksano.

Vintraĵ monatoj, ĉarmaj monatoj! Supozeble vi min pravigas, karaj legantinoj, kaj multe ŝatas la malvarman sezonon kun ĝiaj vesperfestoj, ĝiaj baloj, dank'al kiuj ni kvazaŭ blindigas la amindumeman sekson per niaj vaporaj kaj luksaj tualetoj. Tial, mi esperas ke miaj linioj kaj mia modelo estos benvenintaj.

Tute ravaj estas la metalaj ornamatoj, la brilajetoj vere graciaj semitaj sur tulon orumitan aŭ arĝentumitan, admirinde maldikan; la brodaĵoj faritaj el perloj rondaj aŭ tubformaj; la silkaj brodaĵoj, malhele kolorigitaj, uzataj kiel floroj, ĝirlandoj, festonoj, k. a. Tiel elegantaj kiel novaj, kaj sekve tre sukcesontaj, la zonumoj el fleksebla rubando orumita aŭ arĝentita.

Tre modaj la nigraj tualetoj el tulo aŭ muslino tre ofte ornamitaj per blankaj punktoj el Irlando; tre ŝatataj ankaŭ la nigraj punktoj el Cluny kaj Chantilly.

Vere belegaj la blankaj ĉemizetoj tulaj aŭ muslinaj — kiam la eltraŭĉaĵo estas tre profunda — kiu lasas aperi la haŭton perlumote blankan.

Falbaloj, epoletoj, kvazaŭaj koltukoj plilarĝigas la ŝultrojn. Citindaj la larĝaj rubandoj aŭ punktoj ĉirkaŭantaj la maniklokojn, kaj ankaŭ la larĝaj puntaj kolumoj enkadrigantaj la eltraŭĉaĵon, kaj formantaj nun solan pecon kun la koketaj maniketoj. Tiuj ĉi ornamatoj devenas de Japana stilo, tre moderna, kiu influas sur niajn tualetojn.

Nia modelo estas el silka gazo kremblanka ornamita per falbaloj falditaj, punkto el Irlando, faldoj laŭlarĝe formantaj dentojn kaj zonumo kun longa banto el orumita rubando.

Nun, mi parolu iom pri niaj mufoj. Ĉu vi permesas, ĉarmaj amikinoj, ke mi rakontu al vi fakton okazintan al mi hodiaŭmatene? Mi estis en la florvendejo kaj tie estis ankaŭ afabla samideano, kiu, moke rigardante mian grandegan mufon, diris: « Mi estus tute feliĉa se al vi mi povus prezenti kelkajn florojn; sed en via mufeteto ne estas loko por ili. — Certe ne, mi respondis; malfacilege mi enigis en ĝin la pinton de miaj fingroj. Tamen ĝi enhavas tre kuriozan poŝtkarton el Japanujo, kiun al mi ĵus donis la leterportisto kaj kiun mi tuj montros al vi. » Kaj ŝajnigante, ke mi ne trovas ĝin, mi donante al li mian vizitkartujon petis: « Bonvolu malembarsasi min je tio ĉi, ... kaj ankaŭ je mia monujo, kaj ankaŭ je mia ŝlosilaro, kaj — senkulpigu — ankaŭ je mia naztuko, kaj ankaŭ je miaj korespondadoj, kaj ankaŭ je miaj ĵurnaloj, kaj ankaŭ je mia pudroskatoleto, kaj ankaŭ je mia spegulo, kaj ankaŭ je mia botoleto, kaj ankaŭ..... — Ho! sufiĉe! sufiĉe! ekkriis la malfeliĉulo vere kompatinda kun ĉiuj tiuj diversaj objektoj, kiujn li delikate tenis sur siaj manoj, kaj turnante sin al la vendistino li aldiris: « Preparu dikegan garbon da floroj por tiu fraŭlino, ĉar ŝi havas porteblan kafarnaumon (1). »

Tiu afablulo trovis la ĝustan esprimon. Nune, niaj mufoj estas vere porteblaj kafarnaumoj, moletaj kiel kusenoj, kaj kiom allogaj, kiom elegantaj, faritaj de ni mem el felo, plumoj, pluŝo, veluro, drapo kiel la kostumo, riĉege ornamitaj per silkaj aŭ

muslinaj falbaloj, pasamentaj tintiloj, silkaj galonoj, punktoj, bantoj, floroj kaj ĉio, kion koketulo povas imagi; fine delikate parfumitaj per la bonega parfumo « Hymnis ». Tial, ni povas uzi ilin kiel tualetilojn kaj kiel ornamilojn de niaj buduaroj: ili estas tiel multe belvidigaj!



El « La Mode Parisienne ».

MODELO DE BACHWITZ.

Miaj artikoloj pri la korseto havigis al mi leterojn de malŝatantuloj kaj ŝatantuloj al nia turmentilo. Inter la unuaj estas ĉarma letero de la multfabla S^{ino} Hankel el Dresden (Germanujo), kiun bedaŭre mi ne povas citi tute per manko de loko. Sed laŭ ŝiaj deziroj, mi sciigas al miaj tutmondaj samideanoj, ke ekzistas *Nova senkorseta kostumo* trecege gracia, necesiganta nek zonumon nek korseton, ĉar la vertebraro de l' virinoj, tiel same kiel la vertebraro de l' viroj, tute ne bezonas apogon; kaj prave tiu simpatiinda sinjorino aldiras, ke nur per ĉarmi la okulojn de l' privilegia sekso ni difektas niajn korpcjn.

ROKSANO.



Mallonga korespondado.

Friponokululo. — Vi min minacas, ke vi ofte petos konsilojn de mi; sed tio ne min timigas, kara flatemulo. Kontraŭe mi plezure konstatas, ke la vira koketeco povas konkuri kun la nia. « Le Nigrigène », 130 rue d'Aboukir (près la porte St-Denis) Paris, redonos al viaj hararoj la belan nigrecon, kiun vi tiel forte bedaŭras.

Bruna Londonanino. — Por purigi la haŭton de l' vizaĝo, uzu nur malvarman akvon bolitan aŭ distilitan. Metu, se vi volos, kelkajn gutojn da glicereno sur vian tualettukon.

Freneze amanta sian « Tra la Mondo ». — Vi estas neimageble aminda, fraŭlino, kaj mi ne scias kiel danki vin. Milfoje jes, mi konsilas al vi ĉiam surmeti senkolomitajn korsajojn. Ĉiusezone lasu vian kolon en plena libereco, se vi volas ke ĝi restu bone desegnata, ronda kaj precipe sen sulkoj. Dum la vintro, felo sufiĉas por ĝin ŝirmi kontraŭ la malvarmo.

Ĉiam gaja. — La akvo oksigenumita multe blankigas la dentojn.

Bonvolu memori, ke mi respondas per la revuo je la petoj akompanataj de 0 f. 25, kaj private je la petoj akompanataj de 0 f. 50.

Sin turni al « Roksano » 1 rue Andoque, Béziers, France.

(1) Loko en kiu la plej diversaj objektoj estas senorde metitaj.

R.





Vizito Kembriga.

Kiam oni deziras veturi ĝis la urbo, la unua farinda afero estas, kompreneble ekscii per kia fervojo oni devos iri.

Kembrigo devas esti tre feliĉa urbo, pro tio ke oni povas ĝin viziti laŭ multaj manieroj. Ĝi troviĝas nur okdek kvin kilometroj norden de Londono, kaj la Granda Norda, Granda Esta, Londona kaj Nord-Okcidenta, kaj la Mezlanda fervojoj kune uzas la unu rimarkindan stacidomon, kiun la urbo posedas. La plej uzata vojo estas la Granda Norda. La vagonaroj estas tre luksaj, kaj preskaŭ ĉiam oni kutimas eniri kupeojn de la tria klaso, kie la Parlamenta pago estas dek centimoj po mejlo.

La daŭro de la veturo per la G. N. R. estas, per la rapidegaj vagonaroj, proksimume unu horo kaj kvarono. La vagonaroj havas nur du specojn da kupeoj, Unua kaj Tria klaso, sed la L. N. W. R. ankoraŭ konservas la Duan.

Alvenante ĉe la stacidomo Kembriga, oni tuj ekmiras pro la eksterordinara longeco de la trotuaro. Nur estas du stacidomoj simile konstruitaj. Estas nur unu trotuaro, kaj ĉiuj vagonaroj kompreneble devas halti je la sama flanko. La norda duono estas uzata de la vagonaroj venintaj de Londono, kaj la suda parto de tiuj, kiuj venis de Yorkŝiro, Norfolk, kaj la Nordo.

Tiamaniere oni evitas ĉian supreniradon de pontoj, aŭ mal-supreniradon en tunelojn por transiri la relojn — ĉar en Anglujo estas malpermesite promenadi de unu flanko ĝis la alia, kiel oni kutime faras alilande.

Kembrigo troviĝas en tre plata parto de Anglujo, kaj oni preskaŭ ne povas trovi eĉ monteton en la tuta urbo. Pro tio, la tre antikva tramo, kiun oni eble trovas ĉe la eliro el la stacidomo, estas tirata de nur unu kompatinda ĉevalo, kaj, kiam la tramo estas homoplena, oni tre kompatas la fidelan amikon de la homaro.

Kutime la tramo estas tute malplena, sed espereble ni ŝanĝos ĉion ĉi dum la Kongresa semajno. Unupenco, aŭ dek centimoj, estas la malgranda postulata pago.

En la fruaj jaroj de la fervoja entrepreno, Kembrigo kaj Oxfordo tute malpermesis ke la nedezirinda nova fer-besto tro

proksimiĝu la universitatajn sanktejojn, pro tio la fiakroj ĉiam multope amasiĝas por porti klientojn la tri kilometrojn inter la stacidomo kaj la mezo de la urbo.

Veturante per tiu ebena strato, alilandanoj ĉiam rigardas la longajn vicojn de similaj domoj, posedantajn nenian individuecon kio estas ĉiama trajto de Angla strato. Oni ankaŭ vidas, ke Kembrigo estas preĝeplena urbo, kaj, Dimanĉe, la tintado de sonoriloj estas treega.

Inter la preterpasantoj, oni ofte vidas la longajn togojn kaj ĉapojn de la Universitataj studentoj. Estas tute malpermesite al ili eliri post la sunokuŝiĝo sen tiuj vestaĵoj. Se ili forgesas, ili estas « proktorataj », mona puno okfrankvalora! Pri la ĉarmegaj konstruaĵoj de la Kolegioj mem oni ne povas eĉ ion skribi en tiu ĉi mallonga artikoleto. Iliaj belaj ĝardenoj kaj veluraj herbejoj estas agrablegaj, kia ajn estu la sezono.

Preskaŭ ĉiuj butikoj enhavas ian specialan memorajon de la urbo, niaj Kongresanoj do facile povos plenigi siajn valizojn per diversaj objektoj, kiel ekzemple, tabak-potoj kun unu kolegia devizo, albumo fotografa, aŭ kolbasetoj, pro kiuj la urbo estas fama. Oni ankaŭ sciigas nin ke butero estas vendata laŭ ulno, sed, ne havinte la okazon iom aĉeti, la verkanto ne povas certigi pro tio.

Kembrigo estas ja Kongresurbo, kaj neniam pasas jaro sen ia tiea kongreso. Sed, espereble, la TRIA estos la plej granda, kiu ĝis nun vizitis la antikvan urbon, kaj ĉiuj el la tre bonaj loĝejoj estos plenaj je fervoraj Esperantistoj de Aŭgusto 10-17.

La Organiza Komisiono konsistas el tri personoj, Doktoroj Cunningham, Pollen, kaj Sinjoro H. Bolingbroke Mudie, 13 Arundel Street, London, W. C., kiu estas la Hon. Sekretario, kaj kun granda plezuro ricevas proponojn kaj demandojn de la Esperantistaro deziranta viziti Esperantujon.

Poŝtkartoj por sciigi pri intenco ĉeesti estos tre helpaj.

Originale verkita de

HOBOMO.

CAMBRIDGE LA URBO DE LA 3^a KONGRESO.

Cambridge (elparolu: Kembrig) estas ĉirkaŭe 92 kilometrojn norde de Londono. En ĝi estas glora kaj antikva universitato.

La universitato konsistas el deksep kolegioj. Ĉiu kolegio estas memstara korporacio, havanta sian regularon, kutimaron, kaj administracion por siaj internaj aferoj, kaj por la regado de siaj anoj kaj studentoj. La universitato rilatas al la deksep kolegioj preskaŭ sammaniere kiel la centra registaro en Svisujo aŭ la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko rilatas al la apartaj kantonoj aŭ ŝtatoj. La universitato posedas konstruaĵojn por ĝeneralaj kunvenoj, muzeoj, kaj la lekcioj de tiuj profesoroj kiuj bezonas grandajn laborejojn aŭ eksperimentejojn. Ĉiu kolegio posedas apartajn konstruaĵojn por la ĉiutaga vivado de siaj studentoj. — loĝ-ĉambrojn, lekciejo-ĉambrojn, manĝo-ĉambregon, kaj preĝejon. Tiuj konstruaĵoj prezentas ekzemplojn de ĉiuj arkitekturaj stiloj de la 14^a centjaro ĝis la 19^a — oni povus diri ĝis la 20^a.

La universitato ekzamenas la studentojn kaj donas « gradon »: la kolegioj aranĝas sian ordinaran vivmetodon, stud-

metodon, kaj konduton. Por la kleraj kaj diligentaj studentoj ekzistas multaj kaj grandaj premioj, por ĉiu ricevanto po 1000 ĝis 4000 frankoj ĉiujare dum la daŭro de la trijara kurso. Eble 500 studentoj ricevas tiajn premiojn, laŭ sia klereco kaj sukceso en ekzamenoj.

Sed, por trapasi la trijaran kurson, studento devas havi renton de ĉirkaŭe 4000 frankoj. Per severa ŝpareco, eble li povus sin subteni po 3000 fr. ĉiujare, sed mankus al li multe de la ĝuado kaj interkomunikiĝo de la kolegia vivado. Malmultaj studentoj (ne pli ol 5 procento de la tuto) sekvas la universitatan kurson ne aliginte sin al iu kolegio, laŭ speciala regularo. La studentoj, kiuj ankoraŭ ne havas gradon *undergraduates* — subgradigitoj atingas la ciferon de 3200.

En Cambridge ankaŭ estas urba registaro — urbestro (*mayor*), ĉefburgoj (*aldermen*), konsilantoj (*town councillors*) k. t. p. La urbestro jam decidis permesi al la kongreso la uzon de du ĉambregoj en la urba domo (*guildhall*) senpage, kun aliaj favoraĵoj.

J. C. RUST, Soham, Esp. N^o 10381.

Ni komencas serion de artikoloj pri Kembrigo kaj la vojaĝo tra Britujo pro la TRIA. Ni esperas kaj deziregas ke, dank'al niaj distingindaj kunlaborantoj, ni sukcesos helpi la sindonajn organizantojn de l' Kongreso, atentigante niajn gelegantojn pri la ĉarmoj de la granda insulo, kiu preparas sin kore akcepti ilin, laborante fervore por nia kara afero.

A. M.

Tertremo.

Originalo de AMFITEATROV', rusa aŭtoro.

Post la tertremoj de San Francisko kaj Valparaiso, ĵus nova kataklismo konsternas Amerikon, frapante Angluĵon. Niaj legantoj legos plezure la impresojn de homo travivinta tian teruran okazintaĵon, kaj estos dankaj al nia samideano, Leo Belmont, ilin konigi per sia traduko, verkita por « Tra la Mondo. »

Mi estas migrulo kaj vagisto laŭ mia naturo. Esti alforĝita al unu sama loko de l' terĝlobo dum la tuta jaro — ĝi estas por mi nepenseblaĵo kaj neelporteblaĵo. Homo peka mi, certe, ne atendas, ke mi enfalos la paradizon post la morto; sed se mi, kontraŭ mia espero, tien enfalos, mi pensas, ke neniam oraj pomoj sur arĝentaj pomarboj, nenia paradiza kantado ne ĝojigos por mi postmortan mian loĝadon. Kaj sendube, mi ne tion toleros, mi trovos ian trueton, por ke mi almenaŭ per unu okuleto ekrigardu puriĝejon, aŭ de tempo al tempo faru sekretajn promenadojn en l' inferon al la amikoj-pekintoj, bakataj sur feraj patoj.

Mi vagas prefere tra la landoj sudaj, kie blua ĉielo pendas super blua maro, en la teritorio vulkana, al kiu ne sufiĉas tri klapoj, Etna, Vezuvio, Stromboli', lasitaj de la kontinento Eŭropa al fajro: per ili ĝi de tempo al tempo malfermiĝas sub la piedoj de la loĝantaro, kiam, ĝin disfendante, trairas elĵetajo de fajrospiranta monto, aŭ potencegaj bataladoj de tertremo. En miaj vagadoj, kiel kantas sinjoro markizo, en « Les cloches de Corneville » — estis multe da sufero kaj seniĝoj. Krom fervoja katastrofo, mi travivis ĉiujn malfeliĉojn de migrema aventuristo. En tiu ĉi nombro, kvar tertremoj; kaj inter ili la katastrofo de Konstantinopolo en Julio de la 1894^a jaro.

Mi venis Konstantinopolon el Bulgarujo nelonge post la falo de l' mortinta Stambulov'. Al tiu ĉi okazo alforĝitaj estis tiam la rigardoj de la tuta Eŭropo, kaj la transturno en la naturo de la Balkana duoninsulo pasis iel malmulte rimarkata en sekvo de la transturno en ĝia politiko. Ĝi tamen, kompreneble, ne estis tiel rilate al la loĝantoj de Stambulo, kiuj travivis la tagojn terurajn: la tertremo elŝiris el la mezo de la Konstantinopola loĝantaro pli ol du mil oferuloj.

Kiam mi revenis Rusujon, oni demandadis min en societo.

— Ho, vi vidis la tertremon Konstantinopolan?! Ho! kiel ĝi estis interesa! Ho, rakontu, mi petas, kiel do estadas tertremoj.

Ordinare mi respondadis:

— Tre simple, *madame* aŭ *mademoiselle* N. (ĉar prefere la demandantoj estas sinjorinoj — jam tiel konstruita estas la rusuja societo, ke en ĝi sinjorinoj interesas sin je fortaj sentoj pli ol sinjoroj), tre simple. La tero komencas skuĝi, kaj la domoj — renversiĝi.

Mi konfesas la tutan nekontentigeblecon de tia respondo. Mi konfesas, ke ĝi memorigas la respondon de oficiro de artilerio, kiu demandita de ia fraŭlino:

« Kiel oni faras paflegojn? — klarigis mallonge sed esprime:

— Oni prenas truon kaj ĉirkaŭverŝas ĝin per bronzo! »

Sed malfacile estus respondi alie laŭ la unuaj senklaraj impresoj. Rakonti kaj priskribi aperojn de la naturo estas pli facile uzante komparojn. Sed tertremo decide estas nekomparebla kun io ajn; tiu ĉi apero estas sola en sia speco kaj memdifina. Por ke oni havu ideon pri ĝi, oni devas ĝin travivi, kion, cetere, mi konsilas al neniu krom la memmortigemaj, kaj kion mi ne deziras eĉ al ĵurita mia malamiko; kaj plie, mi estas kuraĝa kredigi, ke, se al vi, elprovinta unu tertremon, okazos travivi ankaŭ duan, vi ricevos de la dua absolute novajn sentojn, kaj ĝi montriĝos al vi plena novaĵo.

Al ĉio oni povas kutimi — diras la homoj saĝaj. La homo ensuferiĝis en plej multkolorajn kaj plej diversajn mizeraĵojn. Eĉ la sola fakto de l' ekzistado de kontraŭbrulistaroj, kontraŭtondriloj, naĝaparatoj, montras, ke li kutimis al la malfeliĉoj de la fajro, de l' akvo, de l' elektro, kaj ellaboris la rimedojn por bataladi kontraŭ ili. Kaj ia anekdota seminaristo eĉ kredigadis, ke estus eble akiri la kutimon faladi de la supro de la preĝejo Isakia, kun ia kapo malsupren turnita. Sed al la tertremoj, oni ne kutimas.

Antaŭ Konstantinopolo, mi travivis la tertremojn en Tiflis kaj en Genova, la lasta estis senpera eho de subtera tondrego, kiu polvigis Menton'ou kaj Nice (Nis). Kaj kio el tio ĉi?... Kiam tertremo alpaŝis al Konstantinopolo, mi ĝin ne rekonis en la komenco. Kaj du-tri sekundojn ŝanceliĝis: « Kio do tio ĉi estas? — ĉu malnova, diigita per Hellenoj kaj per heredo de ilia panteista idoleco, Gethe, Σεισμός el da dua parto de Faŭst, aŭ ia jam ne revivigita, ia nova, jam ne sentita teruro?! » La ĉirkaŭaĵo de Napolo, kie la boriĝo de Vezuvio ofte ŝanceligas la teraĵon, devus, ŝajne, post sia dumiljara historio, eklabori ian *modus vivendi* kun la malnova vulkano, ilia centjara pereigisto kaj samtempe bonfaristo.

Sed mi havis plezuron apudesti ĉe elĵeto de Vezuvio kaj konvinkiĝis, ke Napolanoj al kutimis al ĉiuj petoloj de la fajrospiranta monto — al la riveroj lafaj, al la fajro, al la cindro, al la ŝtonoj brulvarnigitaj. Sed estas io al kio ili neniel povas al kutimigi sian vivameman estaĵon; kiu ĉiafoje ilin, travivintajn en siaj jaroj dekojn da facilaj tertremoj, frapas per sama nehelepebla teruro, same kiel nin, alilandulojn, unuafoje sintrovantajn en tertremo, — tiu ĉi aĵo estas la tero ŝanceliĝanta sub la piedoj, la tremantaj muroj teraj de granda vaporkaldrono Eŭropa. Nekutimebla!

La tertremoj estas kaprice-diversaj en siaj detruantaj atakoj. Unuformaj estas nur la rezultatoj: polvo el domoj, kaj mortuloj el homoj.

Mi diris: tertremo alpaŝis. Pli bone dirote: alŝoviĝis kaj subkuregis! Ĝi ja subiras kaŝe al suferonto, kiel ŝtelisto Kirgiza al ŝafaro. Al mi ŝajnas, ke, ion similan al la konfuztumulto, kiu

surfalas la urbojn tertremigatajn, sentas la stepaj vilaĝoj ĉe la, subitaj kiel fulmo, atakoj de Peĉenegoj, Polovcoj kaj Tataroj: Vesperigas; la ĉielo estas pura kaj bela, la Step' brilas per stipo, karesata de lastaj radioj de l' suno, iranta malantaŭ montetojn. Tra dekoj da verstoĵ ĉirkaŭe murmuretas kanoj sub mallauĉa vento. La vilaĝo estas trankvila; en kampodomoj ekbrulas la fajretoj, la familioj pretiĝas al verpermanĝo, aŭdiĝas la kanto — daŭra kaj larĝa, la kanto de libera stephomo... Sed jen ĉiuj, kiom ajn da homoj estas en la vilaĝo, ĉiuj kune, nepovante kompreni, levas la kapon: en la vilaĝan trankvilecon ekenfluis rivero je neklara bruo — peceta kaj rapida piedfrapado de mil ĉevaloj: ili ekkuris ventume el profundaĵoj kanaj, kie la tutan tagon starante gardon, kuŝis — de neniu vidite kaj neatendite — l' embusko de l' forto malamika. Neniu jam havis tempon solvi: kio do estas tiu ĉi bruo? de kie ĝi iras? — kaj ĝi jam elkreskis en ventegon, jam estas en kortoj!

Hip! Hip! — kriado de duonhomoj-duonbestoj surdiĝas la pace sidantojn ĉe l' vespermanĝo. La tegmentoĵ brulas super iliaj kapoj; falas subhakitaj la kolonoj de staloj ĉevalaj kaj porkaj; la bestaro bruas ĝemante kaj plendante; en la preĝejo sonoregas malfrua tumultsonorilo...

Sensencigita vilaĝano kuras kien liaj piedoj lin portas, faletante sur malvivuloj parencaj, sur korp-oj de frenezigitaj virinoj, kaj enfalas en kaptosnuron. antaŭ, ol li komprenis, kia mizerajo skuigiĝas sur lin? Kiuj estas tiuj ĉi bestsimilaj, flavavizaĝaj eble homoj, eble diabloj, kun ĉapoj, kun okuloj rabistaj, kun krioj kanibalaj!.. Homa ventego trapasis tie ĉi. La bubo, de feliĉa okazo savita, sentanta ke la trankvileco denove regnas sur la stepo, ekrampas el kavaĵo en la lumon dian kaj konfuze, nenion komprenante, rigardas la amason el karboj, en kiun transformiĝis lia vilaĝo gepatra. Kiel do tio? Estis vilaĝo kaj restas cindro... Nek patreto, nek patrino... Deko da malvarmaj sangokovritaj mortintoj... La sentaĵo de tiu ĉi malgrandulo estos partē simila al tiu de homo, kiu vidis « bonan » tertremon.

Ĉu vi volas ankoraŭ unu komparon? Mi havas ĝin de mia amiko, Anglo, S^{ro} Malten, kiel mi, tutmonda vagisto: sola homo, al kiu mi envias: kien do lin ne jetadis... malbonsorto! — diros la profanoj; la bonsorto!, — korektos ja ni, sportistoj de vagado sub fremdaj ĉieloj, kaj envie eksopiros al la feliĉo de ĉieestinto. Malten estas homo de malofta, frapanta malvarmsangeco; mi mem, mi ne timas pro tio min laŭdi, ne estas konfuziĝemulo, sed tiu ĉi Anglo multfoje min frapegis; li estas enkorpiĝo de spiritĉeesteco, de kuraĝeco morala kaj fizika.

En la tago de l' tertremo Konstantinopola mi renkontis lin en la ĝardeno *Aux petits Champs*. Ĉirkaŭe oni bruas, kriis, ploregis, malbenis; centoj da virinoj svenadis, kurbiĝadis en konvulsioj histerikaj; mi vidis la virojn, oficirojn, — kaj certe neniu do diros, ke oficiroj turkaj estas timemuloj — bluigiĉintajn vizaĝe, kiel la drapo de ilia uniformo. Sed la turkoj almenaŭ sin tenis kaj penis sin teni konvene. Ilin, laŭ orienta ilia fatalismo, vi mirigos per nenio: *Kismet!* — en ĝi estas ĉio. Kaj kvankam de tia « Kismet » devenas ia malbonegaĵo, Turko iras, per ĝi en sia buŝo kun tia mieno, kvazaŭ ĉio sukcesegas, kvazaŭ li neniam atendis ion pli bonan.

Grekoj tamen, Armenianoj kaj Italoj, eĉ longevivintaj, kun duongrizaj barboj, ploregis virinmaniere, ruliĝadis pro malespero sur la tero, aŭskultadis ĝian mortotremetojn, alvokadis la popojn kaj atendis la mondoĉiĝon. Neniam mi forgesos hebreon: li kaŝiĝis sub ĝardenan benkon, enŝovis sian nazon en la teron, kiel struto, surmetis sian surtuton sur la kapon, kaj tiel kuŝiĝinte, liaj piedoj batetadis konvulsian takton sur la vojeto. Du konatoj miaj, bulgaroj — *attachés* de agentaro diplomacia, kuras sen ĉapeloj; ĉe ambaŭ dento sur la denton ne trafas... Komencas, unutradue, senorde, rakonti al mi, kiel ili iradis restoracion, kaj kiel subite la domoj en strateto ekkliniĝis super ilin, kvazaŭ bovoj, pretaj interpuŝi sin reciproke per kornoj — kaj preskaŭ tute ili estis renversotaj sur la malfeliĉajn fratetojn slavajn... sed la dua ekbato rerekigis la straton. Kajjen, inter tiu ĉi aro da homoj frenezigitaj mi senatende trovas Maltenon: li sidis ĉe tableto sub verdbalkono de ĝardeno restoracio kaj brue frapadis, alvokante la serviston; tiu ĉi lasta ekaŭskultis lian ordonon kun konfuzaj, duonkonsciaj okuloj kaj kaŝiĝis. Sed tia estas la forto de la kutimo servista kaj de l' malvarmsanga inspiro! Tuj li revenis kaj metis antaŭ Malten' karafeton da *cognac*, glason da akvo kaj telereton kun biskvitoj. Kaj poste malfermigis la okulojn pro la mirinda gasto, sendube miranta kaj pri li, kaj pri si mem: « kiel do li kuraĝiĝis mendi, kaj mi — obei kaj plenumi lian ordonon? »

— Kion do vi faras?! — rimarkis mi riproĉe al la Anglo, salutante lin.

— Kion do? — kun miro respondis li, irigante la glaseton al sia buŝo.

— Jes... ĝi estas kvazaŭ nekonvena... meze de tia haoso de malespero, kaj vi... trinkas *cognac*'on!

— He, ĉu aperis do ia leĝo, malpermesanta trinki *cognac*'on dum tertremo?

— Ne! sed...

— Kaj ĉu la tertremo finiĝos tial ke mi, John Malten, *esquire*, ne trinkos *cognac*'on? He! pli bone eksidiĝu apud mi kaj ankaŭ trinku: laŭ via aspekto ĝi ne estos superflua.

Ĉe mia rusa sentimentalismo, la malvarmsangeco de Malten ekŝajnis al mi, komence, preskaŭ senkoreco.

Kio do estas ĝi: vidi malfeliĉon kaj nenion ek-senti? Sed kion mi ne sciigiĝis poste? Tiu ĉi heroo en la momento de l' tertremo estis en Stambulo, en tiu sama malnova bazaro, kie ne restis ŝtono sur ŝtono, kaj kun danĝero por sia propra vivo, eltirinte el-sub la ruinoj kelkajn turkajn infanetojn, li mem iafoje rampante sur la manoj, tratrenis ilin ĝis la ŝipoj de l' Ora Korno... Jes, post tiaj heroaĵoj, havas do homo la rajton trinki *cognac* eĉ en tempo de tertremo!


Malten ja rakontis al mi la sekvantan okazon. Lia kuzo, suboficiro de l' armeo Hinduja, ian dimanĉon, ekiris el Kalkutto ĝis eksterurba farmo, kiel gasto ĉe amiko.

En la farmodomo, li trovis feston; je la vespero, ĉiu estis malsobra — sinjoroj kaj servistoj, Angloj kaj Hindoj, homoj kaj elefantoj. La kuzo de Matten estas homo poeziema; eĉ li skribas versajojn.

Dauronta.

Esperantigita de LEO BELMONT,
(Polujo).

Ano de l' Lingva Komitato.



GLICERINA DENTPASTO

Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES
Parfumistoj
PARIS
La firmo korespondas Esperante.

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

Viskio Esperanto

Registered trade mark No 270,042. Marque déposée No 13,195.
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & Co
GARTHLAND STREET,
GLASGOW (Skotlando).
Telegrafa adreso : Esperanto - Glasgow.



ESPERANTINE

Digestiga likvoro
Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1906

PREZO : FRANCAJE. — 11 fr 50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALLIANDE. — 4 fr ĉiu botelo prenita en St Etienne, impostoj kaj transporto pluaj.

Ĝenerala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo :
J. B. Brunon-Chauvet
St Etienne (France).

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senprezare deĉifri kaj legi ĉion esperante skribitan » Enmetebraj en leteron sen pligo de la poŝtkosto

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, ilala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

LA MIÉLINE GELSON

MIRINDA RIMEDO KONTRAŬ

La falo de l' Haroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe

FERRÉ, BLOTTIÈRE & C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ PROPAGANDAJ.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« TRA LA MONDO »

La serio (6 kartoj), afr.: 0 fr. 40 c.
5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.
10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.
15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.

Pageblaj poŝtmarke aŭ monopapere.

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée
VINTRO 1906-1907

Rapidaj rilatoj inter Paris kaj Italujo

TRA SIMPLON :

- a) per la luksa vagonaro « Simplon-Expres » (V-L. V-R.) Deiro de Paris P. L. M., lunde, merkrede, sabate, je 8 h. 30 m. vespere. Paris-Milan en 15 h. — London-Milan en 24 h. 30 m.
- b) per la novaj vagonaroj 59 kaj 512 (1a, 2a, 3a klasoj) ĉiutaga.
Iro : Paris... 10 h. 40 vespere. — Milan (H. C. E.)... 7 h. 55 v.
Reiŝo : Milan... 10 h. 35 mat. (H. C. E.) — Paris... 6 h. 20 m.

TRA MONTO-CENIS :

Per la luksa vagonaro « Paris-Roma » (V-L. V-R.) Deiro de Paris P. L. M., lunde, jaŭde, sabate (1a de Decembro — 18a de Majo) : 11 h. 20. m. Deiro de Roma, lunde, merkrede, sabate (4a de Dec. — 21a de Majo) : 1 h. 40 v.
Nota. — En la luksaj vagonaroj « Simplon-Expres » kaj « Paris-Roma » la nombro de l'lokoj estas limigita.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR
118, Rue d'Assas, PARIS.

FOTO-REVUE INTERNACIA

A BONOJ: Jare 5 Frankoj. — I Numero aparte 0.50.
estas la ĉiunonata resumo de



Journal des amateurs de Photographie.

— QUI PARAÎT TOUS LES DIMANCHES —

ABONNEMENTS :

FRANCE 6 FR., ÉTRANGER 8 FR.

ANGLA-ESPERANTA LERNEJO POR KNABINOJ.

Tutjarloĝantinoj. Fraŭlino EVERDELL L.L.A.
College House, Bridgwater, Somerset, Anglujo
— Korespondas Esperante. —

Ĉampanvino "Mirinda"

1 fr. 75 kaj 3 fr. 50 ĉiu botelo por 12 boteloj, minimume, enpakitaj en keston.
Ĉe S^{ro} Ch. JADEAU, MERCUREY (S. & L.) France.

SE

vi konas malfacile spiranton (astmemulon), vi faros al li servon konigante la « Remède d'Abyssinie Exibard » (Abisinia kuracilo EKSIBAR), pudre, cigarede, aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabakon en la pipo. Tiu kuracilo, ordonata de ĉiuj kuracistoj, sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare. Sin turni al

Sinjoroj H. Ferré, Blottière et C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

L'Internacia Signo

estas la « **VERDA STELO** » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emilo Gasse, 105, rue du Lycée, Le Havre (France).

**MILKA
VELMA
NOISETTINE**

Suchard

LA BONGUSTEGAJ
ĈOKOLADOJ
POR MANMANGI.

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mondo.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Eŝo Esperantista — Praktika kaj komerca. Ĉe S^{ro} H. Brühl, Unter den Linden 47 III, Berlin, Deutschland. Jare, 2 markoj.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe S^{ro} Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Esperanto. Duonmonata Internacia Gazeto. Tutmonda informilo. Diversnaciaj eldonoj; ĉiulandaj korespondantoj. Praktitaj informoj. Novaĵoj el la tuta mondo. Organo de la konsuloj kaj peresperantaj societoj. Aperas en ĵurnala formato. *La plej malkara! la plej ofta!* Jarabono: 3 frankoj. Unu numero: 40 centimoj. Direkcio: 8, rue Bovy-Lysberg, Genève, Svisujo. La unua numero aperos en Februaro. Oni nepre legu ĝin. Premioj al la legantoj.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu N^o afrankita Of. 50; Francuje, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Foto-Revuo Internacia. — Ĉiunonata resumo de Photo-Revue. Jara abono, 5 fr. 1 Numero aparte, 50 cent. Ĉe la « Librairie photographique » Charles Mendel, 118 Rue d'Assas, Paris.

Idealo. — Organo de « Sicilia Federacio Esperanta ». Italuje, 2 fr. alilande, 3 fr. Corso Catalafimi, 495 Palermo (Italujo).

Juna Esperantisto. — Tute Esperante. Divastigo de Esperanto ĉe la ĵunularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Volandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boul'd St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

Lingvo Internacia. — Monata Esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komenciĝo de ĉiu monato.

Unua Paŝo. — Monata bulgara gazeto en Esperanto. Pri traktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S^{ro} S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofia, Bulgario.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Amerika Esperantisto: Gazeto por la Lingvo Esperanto en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, angle kaj Esperante. Bele presata. Jara abono: 1 dolaro. Adreso: L'Amerika Esperantisto, Oklahoma City, U. S. A.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scjenco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. jare. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique). La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 20 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj da literaturo tute en Esperanto. Jare 4 fr. — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Centrameriko Esperantista. — Hispane kaj Esperante. F. R. G. Abrill, 8^a Avenida Sur 11, Canton Libertad, Guatemala, Ameriko.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la SfpE: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francuje 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

Esperanto. — Hungare kaj Esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^{ro} Marich Agoston, Papnövelde-Utea 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiunonate) Redaktata germane kaj Esperante. JARABONO, 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prizzenstrasse.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, — kun ilustraĵoj. Jarabono 2 fr. 60 — N^o 1^a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Pioniro. — Ĵurnalo Esperanta India. Eldonata de la Kolar Gold Field Esperanto Club. Monata abono: kvar pencoj. Red. kaj Adm.: Hon^a Sek^o de la klubo esperantista de la K. G. F. Marikuppam, Mysore State, South India.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiunonata organo de la S-to « Espero »; Esperante kaj ruse — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de la lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj kaj bibliografio; novaj famaj beletristikaĵoj, versaĵoj kaj mult. al. — Detalaj prospektoj riceveblaj, senpage. — Jara abonpago kune kun membrigo en la S-to « Espero » — 3 rubloj (8 fr.) — Adreso: Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjačeskaja, 24, al la S-to « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Esperanto).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profito de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Le Cycliste. — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D^{ro}: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francuje 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. — Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun meĥanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieno ciklista.

La Gazette de Lausanne. — Journal politique et littéraire. Organe de 1^{er} ordre. Grand format. Fondée en 1798. Paraissant six fois par semaine. — *La Gazette de Lausanne* est un des journaux les plus appréciés et les plus répandus de la Suisse et de l'étranger. Elle offre à ses lecteurs un ensemble de renseignements complets, soit sur les affaires du pays, soit sur la politique étrangère. Elle a des correspondants dans les principales villes de la Suisse. De même à Paris, Bruxelles, Rome, Berlin, etc., d'où elle reçoit des lettres périodiques. — *La Gazette de Lausanne* a pour collaborateurs les meilleurs écrivains de la Suisse romande. Elle publie des chroniques artistiques, musicales, scientifiques et militaires. Feuilletons choisis. Service télégraphique étendu.

De Lushhof. — Ĉiunonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj. Jara abono: 2 frankoj.

Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belgando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiustistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. *Petu specimenon.*

Nekomercaj anoncetoj.

25. Mi sendos cent malsimilajn poŝtmarkojn el francaj kaj neerlandaj kolonioj al tiuj, kiuj sendos al mi cent malsimilajn poŝtmarkojn el anglaj kolonioj, prefere malnovajn. Fize, au Pastissou à Béziers, France.

26. Paŭlo Keilich, Cöln-Lindenthal, Gleuelerstrasse 135 (*Germanujo*) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. Li sendas markojn germanajn.

27. S^{ro} Samppa Luoma, instruisto, Suomi, Nurmijarvi, Finlando, deziras interrilatiĝi kun francaj kolegoj kaj korespondi pri francaj popollernejoj, precipe kamparaj.

28. S^{ro} L. de Guesnet, sporta redaktoro de « Tra la Mondo » aĉetus 1 fr. 50 la n^o 12 (unua jaro) de Internacia Scienca Revuo, enhavanta la tabelon de l'teknikaj vortoj (9, Rue Chauveau-Lagarde, Chartres, France).

Ni tre atentigas pri tiu anonco al kiu, por niaj legantoj, ni deziras sukceson.

29. S^{ro} Alexandre Billarand, Ermont-Cernay, Seine et Oise, (France) deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun gesamideanoj de ĉiuj landoj (Esceptante francajn). Promesas respondi ĉiam kaj tuj.

Malgranda korespondado.

S^{ro} Julio Lizana Gal (*Bilbao*). — Vi sendis 10 fr. anstataŭ 8 por via abono. Kion ni devas fari el la du pluj frankoj.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.

A. J. WITTEBYCK, Presisto, Bruĝo.